



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Marto 2019 n-ro: 39



## Merhaba,

Bu sayımızdaki rekor sayıdaki (30) çok güzel makalelerden sizlere bazı tavsiyelerimiz:

- \* Konuralp Sunal'ın Mühürlenmiş Zaman köşesi
- \* Demokratik Kongo'dan Honore Sebuhero'nun şiiri
- \* Nazım Hikmetin Bir Küvet Hikayesi adlı şiir çevirisi
- \* Enrique ElleMBERG'in Esperanto'yu Nereden Duydum adlı yazısı
- \* UEA'nın özellikle dili öğrenenler için kolay metinlerin olduğu yeni UEA.Facila sayfası hakkındaki yazı
- \* Felsefenin Kısa Tarihi köşesindeki makale

ve daha dünyanın bir çok ülkesinden: Letonya, Arnavutluk, Hollanda, ABD, Brezilya, Yunanistan, Fransa, Venezuela, İzlanda, Rusya, İtalya, Avustralya, Polonya ve Çekya'dan enteresan makaleler.

Not. "Tao'nu kitabından" adlı seri yazımızı bu sayıda atlamış olduk.

**Hepinize iyi okumalar !**

## Saluton,

En ĉi tiu numero estas rekorda nombro de artikoloj (30) kaj jen kelkaj de niaj sugestoj el ili:


- \* La rubriko Tempo Sigelita de Konuralp Sunal
- \* Poemo de Honoré Sebuhero el DR Kongo
- \* La tradukita poemo Rakonto pri Bankuvo de Nazim Hikmet
- \* La rakonto de Enrique ElleMBERG, Kiel mi ekaŭdis pri Esperanto
- \* Pri la "UEA Facila" retejo por progresantoj
- \* La tre interesa artikolo en la rubriko Mallonga Historio de Filizofio

kaj ankaŭ interesaj artikoloj el diversaj landoj de la mondo: Litovio, Albanujo, Nederlando, Usono, Brazilo, Grekujo, Francujo, Venezuelo, Islando, Rusio, Italujo, Aŭstralio, Pollando, kaj Ĉekio.

Rimarko. En ĉi ti numero ni preteratentis la serian tekston "El la libro de Dao de Jing".

**Bonan legadon al ĉiuj !**

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

## TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Maljuna Fraŭlo	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
48a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto	4
Ĉi tiu mondo	4
Tempo Sigelita	5
Poemoj de Paulo Sérgio Viana	6
...mia esperanta verkisteco estas al mi pli kara	6
HELIO kaj FAETONO (ΗΛΙΟΣ και ΦΑΕΘΩΝ)	8
Hahaŭ kun Andreo per Esperanto	10
Rakonto pri bankuvo	11
La fipovruloj	13
Kiu estas pli ruza?	14
Mallonga Historio de Filozofio (38)	15
Ŝercoj	16
Kurcvortenigmo	16
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 10)	17
Farmisto Gamli serĉas ŝafojn en valo Glerárdalur	18
Pasantoj kaj Hundoj	18
Kato kaj muso -aŭ- Ekzisto, Unu Komuna Afero	19
La legenda kreo de la lingvo Esperanto	20
La revuo Brazila Esperantisto centdekjariĝis	21
Elizo de la kamentubo	22
MIRI kaj ADMIRI	22
Kiel mi ekaŭdis pri Esperanto?	23
Kiel mi starigis oficialajn Esperanto-kursojn en mia universitato en Venezuelo	23
Facillingva retejo de UEA	25
Facillingva retejo	25
Ankaŭ Zamenhof estis komencanto	25
La bela kaj perfekta Esperanto	26
La Sperto de Meditado	26
Kurantaj Birdoj	27
Unesko Kuriero	30
Ni Lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32
Nova romano de Julian Modest	32

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj

landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

## MALJUNA FRAŬLO

En urbo Krakovo estis naskiĝinta  
La maljuna fraŭlo nun decidiĝinta  
Finfine edziĝi al iu virino,  
Kun kiu feliĉe vivus ĝis vivfino.  
Virinojn li havis tutan galerion:  
Praksedon, Ludvikon, Lidon, Valerion,  
Doroton, Irenon, Evon kaj Barbaron,  
Esteron, Kamilon, Olenjon, Tamaron,  
Aldonon, Danuton, Rozon kaj Renaton  
Kaj krom menciitaj – ankoraŭ Agaton.  
Do povus edziĝi li baldaŭ kaj nun,  
Eĉ tion intencis, sed trafis lin pun'.  
Ĉar: Prakseda – tro teda, Zenona – kanona,  
Kama – tre lama, Maria – pasia,  
Luĉia – tre pia, Ludvika – tre dika,  
Aida – avida, Anĝela – nobela,  
Jolanta – svenanta, Sofia – tre fia,  
Irena – sintena, Brigida – rigida,  
Barbara – avara, Eliza – jam griza,  
Edwarda – amtarda, Elvira – tro vira,  
Helena – venena, Jadviga – pekiga,  
Anita - tro sprita, Ivona – poltrona,  
Marcela – malbela, Lida – senbrida,  
Regina – obstina, Agata – amsata,  
Ema – klaĉema, Beata – olddata,  
Danuta – tro muta, Paŭlina – putina,  
Eŭlala – tre pala, Tamara – ruĝhara,  
Roza – nervoza, Lila – gracila.  
Kion fine faris mizerulo tiu,  
Certe pro scivolo demandos nun iu.  
Jen antaŭ formita virina spaliro  
Li nun promenanta kvazaŭ en deliro  
Al impostej' kuris inter ĉi vicaroj  
Por pagi imposton por pluaj ses jaroj.  
La fraŭlan imposton li pagis prefere,  
Por plu farti bone, feliĉe, libere.

Aŭtoro nekonata

Esperantigis: **Edward Jaŝkiewicz** el Pollando

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



La januara 56-a Sumoo finiĝis kun sukceso danke al via partopreno kaj prizorgo de la prizorgantoj. Jen

mallonga analizo:

### 1. Partoprenantoj: 302 el 36 landoj

Septembro 2018 : 336 el 31 landoj

Novembro 2018 : 331 el 33 landoj

Januaro 2019 : 302 el 36 landoj

### 2. Laŭlandaj nombroj :

1. Japanio: 76
2. Brazilo: 42
3. Francio: 31
4. Pollando: 21
5. Svisujo: 14
6. Rusio: 13
7. Vjetnamio: 10
8. Italio: 10
9. Ĉinio: 9
10. Germanio: 9

### 3. Perfektaj venkintoj (15 venkoj):

269 el 302 (89,1%)

### 4. Kvanto de legitaj paĝoj:

pli ol 18 000 paĝoj

### Recenzoj de januaro aperas en nia retejo

**La Marta sumoo komenciĝos la 17-an de marto kaj finiĝos la 31-an de marto.**

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>  
Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 783 (2019-02-20)

**Universala Esperanto-Asocio: Mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj**

### kaj Unesko okaze de Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2019

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo, plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bangla, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo "pli granda", parolata de la fortuloj de la momento. [...]

N-ro 782 (2019-01-31)

**Biblioteka Apogo Bachrich subvencias 15 bibliotekojn**

La Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj, asignis subvenciojn — uzeblajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn aĉeteblajn ĉe la Libro servo de UEA — al 15 bibliotekoj okaze de la jara alvoko de 2018, pozitive konsiderante ĉiujn petojn ricevatajn en la pasinta jaro. El tiuj 15 petoj, 2 povis esti tute plenumitaj kaj la aliaj 13 estis parte plenumitaj. [...]

N-ro 781 (2019-01-27)

**La decembra numero de la revuo Esperanto elŝuteblas senpage**

En la retejo <https://revuoesperanto.org> estas senpage elŝutebla la decembra numero de la Revuo Esperanto, la plej renoma periodaĵo en Esperantujo, aperanta jam la 112-an jaron. La numero estas fermanta la jarkolekton 2018. [...]

## TEJO



**TEJO-studsesio por landaj kaj fakaj sekcioj**

La TEJO-studsesioj estas specialaj kapabligaj kaj junulargvidataj programoj por niaj landaj kaj fakaj sekcioj. Ĉi-jare ni celas organizi la studsesion en partneriĝo kun la Junulara Departemento de la Eŭropa Konsilio. Tio signifas ke la landaj kaj fakaj sekcioj devas registriĝi kiel partneroj por la studsesio antaŭ la sendado de la kandidatiĝo por financado. Ni pretigis [...]

### TEJO serĉas partnerojn por nova projekto

TEJO serĉas partnerojn de la eŭropa regiono (esperantaj junularaj asocioj aŭ esperantaj asocioj kiuj havas rilatojn kun TEJO) por nova projekto: plilaŭtigi la voĉojn de la junuloj en la demokrata procezo. La projekto estos financita de la Eŭropa Kultura Fonduso. Grandaj sumoj estas disponeblaj por organizoj: 30,000€ – 50,000€. La Eŭropa Kultura Fonduso financas kreemajn [...]

### Aliĝu al interesgrupo de TEJO pri Juro

Ĉu vi ŝatus helpi al TEJO kreski en sia junulara agado ene de jurbazitaj kaj laŭleĝaj kadroj? Ĉu vi interesiĝas pri la reguloj, la rajtoj kaj la devoj de internacie funkcia organizaĵo? Ĉu vi volas interŝanĝi kaj helpi en la kreado de bonaj juraj praktikoj en internacia kunteksto? Aliĝu al nia grupo pri juro kaj [...]



## Leteroj de niaj legantoj



Karaj turkaj amikoj!

Kiel partoprenanto de Internacia Esperanto-Sumoo mi ricevis la revueton "Turka Stelo" de Hori Jasuo. Fakte la revueto ne plu estas revueto, sed bona esperanta revuo riĉa je informoj kaj internacia kunlaboro. Laŭ la raporto de Turka Stelo januaro 2019 n-ro 37 pri la Festo de Zamenhofago, nur 25 homoj partoprenis en la festo. Tio signifas ke la Esperanto movado en Turkio ankoraŭ ne estas tiel forta. En tia granda nacio kiel Turkio, mi atendas minimume 200 esperantistojn. Eblas ke Turkio estas granda, kaj homoj ne facile kune renkontiĝas pro vojaĝado. Ĉar la revueto nomiĝas "Turka Stelo", mi atendas artikolojn pri Turkio, turka kulturo, turka popolo, turka literaturo ktp. Sincere via leganto

**Abengo Cho** el Tajvano



Kun ĝojo mi ricevis la bonegan revuon Turka Stelo!

Gratulon, karaj!

Kaj dankon por aperigi miajn poemojn!

Amike,

**Maria Nazaré Laroça** el Brazilo



La februara Turka Stelo revuo estas tre bona kaj riĉenhava. Kara redaktanto mi rimarkis dum jardekoj, ke simpatia viro aŭ virino, ekzemple kiel Júlia Sigmond kaj vi, arigas legantojn ĉirkaŭ siaj revuoj. Turka Stelo fariĝis konata kaj ŝatata.

**Lenke Szás** el Rumanio

## 48a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto

**48a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto**

**20a ĝis 27a de julio 2019**

**en urbo Lahtio, Finnlando/Suomujo**

**Temo «mil kaj unu lagoj»**

infanoj kaj ŝatas ludi kun ili.

Legu pli ĉe: <http://bertosch.free.fr/iik2019/>

Bonvenon en la retpaĝaro de IIK, kiu okazos de la 20a ĝis la 27a de julio 2019 en randa kvartalo de la urbo Lahtio, norde de Helsinko, samtempe kun la **104a UK**. La infankongresa temo provizore estas « mil kaj unu lagoj », ĉar ni vivos apud la 1001a! Vizitu la **IIK-kongresejon**.

La skipo konsistas el diverslandaj gvidantoj, iuj partoprenis IIK-on jam plurfoje, aliaj venos unuafoje. Ili profesie laboras aŭ laboris en lernejoj, kutimas zorgi pri infanoj kiel animanto en kulturcentro aŭ kiel gepatro en sia hejmo. Ĉiuj gvidantoj lertas zorgi pri



## Ĉi TIU MONDO

verkis ka sendis Honoré Sebuhero, el DR Kongo

Kial mi estas malfeliĉa en ĉi tiu mondo?  
Mi suferas, mi ne havas parencojn, mia Dio!  
Kial mi eniris en la mondon, se mi scius

Ĉi tiu mondo estas materiisma,  
ĉio aĉeteblas, cigaredo, alumeto.

Vi estas malriĉa mia kara, neniuj heredaĵo, neniuj  
kandelo

En ĉi tiu mondo ekzistas homoj kun kalcinitaj koroj

Estas homoj kun brulitaj spiritoj,

kiel bubaloj en la arbaro

Estas homoj sen fido, leĝo aŭ vizio

Malamikeco, malamo, tribalismo, estas la loto

Amikeco estas mono, riĉeco estas blanka

La malriĉulo estas nigra, li devas iri al infero

Kiaj nedankemaj, kiel hipokritaj en ĉi tiu mondo!

Kaj la ĵaluzuloj, sorĉistoj, kaj friponoj  
Kial mi estas en la mondo? Ĉu necesas  
bedaŭri pri ĝi?

Estas distritaj homoj, apartigitaj,  
skuitaj

Estas homoj, kiuj ne estas kontentaj  
de mi

Kion mi faru, estas la obstaklo al kiu?

Kiu! Mi estas malriĉa, handikapita, ĉu mi?

Mi ne havas amikojn, ĉar mi nenion havas krom  
debatoj pri mi

En ĉi tiu mondo, ĉu mi estas frato, amiko, mizerulo?

"Ĉu la kantisto Koko kun elegantaj flugiloj povas  
forgesi la ovan grandecon?"



## LA BALONO RUĜA

**K**anadana mimo, Adrian Pecknold, skribis mimodramon bazitan sur ĉi tiu filmo. Mi uzis ĝin en aŭdintervjuo. Mi tradukis kaj ludis ĝin. Turka eldonisto kaj verkisto Erdal Öz romanigis ĉi tiun filmon. Mi pensas, ke ĝi estas rara ekzemplo pri adaptado de filmo al romano. Iu alia, kiun mi memoras estas la romano de Isaac Asimov adaptita de la filmo "La Vojaĝo Fantasta". Asimov legis la skribon de la filmo antaŭ ol ĝi estis farita, Li konsentis kun la filmkompanio kaj finverkis la romanon antaŭ ol la filmo estis publikigita. Sekve, multaj homoj opiniis, ke la filmo adaptiĝis detiu romano. Ĉiukaze... Nia temo estas la filmo "La Balono Ruĝa".



La Balono Ruĝa estas fakte spektaklo-poemo. Simpla, sincera kaj bela...

La filmo komenciĝas iumatene en la jaro 1956, kiam la knabo Pascal, kiu estas lernanto (li ludas la ĉefrolon en la filmo kaj li fakte estas la filo de la direktoro Albert Lamorisse) karesas katon antaŭ ol li subengrimpas ŝtuparon en Parizo. Tiel komenciĝas la ago en la filmo. Ĉi tiu kato jam fariĝis tero kaj tiel ankaŭ la plejmulto de la homoj en la filmo. Mi ĉiam pensas pri tiaj aferoj, kiam mi spektas malnovajn filmojn. Kiel strange, la aktoroj kaj la bestoj en la filmoj, forpasas kaj eterniĝas, sed la kopio de ilia fizika ekzisto daŭre vivas en la filmoj. Pascal Lamorisse ankoraŭ vivas. Li estas 69 jaraĝa. Li ankaŭ rolis en alia filmo de sia patro pri ĉevaloj: "White Mane".

Laŭlonge de la filmo la ruĝa balono estas portretata kiel homo, infano ŝercema, malobeema sed lojala estaĵo. Tiu knabino kun la blua balono kaj la mallonga momento dum kiu la blua balono flirtas kun la ruĝa! Ĉi tiu sceno estas tre bela! La filmo ankaŭ estas la vojaĝo de ĉi tiu balono. Kiam la lokaj knaboj postsekvas Pascal'on kaj fine kaptas lin en iu najbara

malplenaĵo unu malbona knabo ĵetas ŝtonon al la ruĝa balono kun ŝtonĵetilo. La posta sceno estas tiom bela: la ruĝa balono ŝrumpiĝas kaj malrapide kliniĝas surteren kaj finfine ĝi "mortas". Jes, la direktoro nin pensigas ke ĝi mortis. La amikeco inter la ruĝa balono kaj Pascalo estas tiel klare kaj simple rakontata.

Jarojn poste, multaj homoj de malsamaj aĝoj ankoraŭ memoras ĉi tiun filmon, la kialo estas la simpleco kaj poezieco de la filmo. La filmo gajnis multajn premiojn. Sed filmoj, kiuj entroniĝas en la koro de la spektantaro, ne bezonas premiojn. La rigardoj de Pascal ankaŭ estis tre bone uzitaj en la filmo. Mi demandas min, ĉu sinjoro Pascal re-spektis ĉi tiun filmon post kiam sia patro mortis? Kaj kiom da fojoj?

Albert Lamorisse, kiu kreis fenomenon kaj subskribis verkon, kiu estis memorata dum multaj jaroj, mortis en aviadila akcidento ĝuste tiel, kiel Antoine de Saint-Exupery kiu verkis la romanon: "La Malgranda Princo". Ĉu ludo de sorto?

Artikolo pri mallonga filmo devas esti mallonga. La knabeto post la morto de la ruĝa balono estas ĉirkaŭita de 'ribelemaj balonoj', kiuj disflugas el ĉiuj partoj de Parizo. Kaj li suprenleviĝas en la aeron post li kolektas la balonojn kaj kunvenigas ilin farante unu gigantan balonon. Li flugas al la ĉielo el inter la plenaĝuloj kaj kruelaj infanoj kiuj ne zorgas pri lia balono. Ni ne scias pli pri la sekvaĵo. Ĉu ni diru ke li vivis feliĉa same kiel en la fabeloj... Aŭ eble ni diru ke li komencis vojaĝon al nova mondo, kie la balonojn neniu suferigas?

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo



## Poemoj de Paulo Sérgio Viana

### PAŜOJ

Tri paŝojn daŭris la iro,  
kun du stumbloj, intermite;  
la vivo, kiel suspiro,  
pasis for kaj tro subite.

Per la paŝoj mi eksciis,  
ke mi lernis tro malmulte;  
per la stumbloj, ekkonsciis,  
kiom kostas vivi stulte.

Nun jam finiĝas la vojo  
kaj nun restas paŝo lasta;  
kaj mi vidas, kun malĝojo:  
ĝi povus esti pli vasta...



Fonto:

<https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/>

### AMIKO

Se vi bezonas amikon  
kaj fidelan, kaj diskretan,  
jen mi donas la indikon:  
prenu la libron surbretan.

La libro ne fanfaronas  
kaj vantecon ĝi ne kultas:  
ĝi diras, kion ĝi konas,  
kaj nur se oni konsultas...



verkis **Paulo Sérgio Viana** el Brazilo

### FRUKTOJ

Sur la arbo kreskas frukto,  
en la koro kreskas sento;  
ambaŭ estas la produkto  
de la sama fundamento.

### LA ARBO

Per ĉiu sia folio  
la majesta arbo spiras;  
ĉe fenestro, kun envio,  
la homo gape admiras.

### BRAZILANO

La kapon de brazilano  
artisto skulptis tre bele.  
La forta mestiza mano  
konstruis landon, fidele.

### CENTELHA \*

Pro la lasta sunradio,  
antaŭ alven' de vespero,  
fariĝas ruĝa l' folio.  
Morgaŭ revenos espero

\* *fajrero*

**7 >>** legmaterialo, kiu kvazaŭ eksplode vastigis mian horizonton kaj maturige influis mian sintenon al la lingvo kaj ĝia kulturo.

Fininte la gimazion mi transloĝiĝis al Rejkaviko por studi en universitato. Jam tiam mi fianĉiĝis al mia samklasanino Thorey, kiu ankaŭ lernis Esperanton. Ankaŭ ŝia patro estis elstara esperantisto. Kiam mi vizitis unuafoje la hejmon de miaj estontaj bogepatroj - tiam ankoraŭ gimnaziano - la patro de mia fianĉino, pastro Halldor Kolbeins, alparolis min en Esperanto, kaj nur post duonhora li ŝanĝis al la islanda. Ankaŭ nia filo Ragnar flue parolas Esperanton. Do ni havas ĉi tie tri generaciojn de esperantistoj.

Veninte al la ĉefurbo mi tuj aliĝis al la Esperanto-societo tie, al kiu mi apartenis ĉiam poste. Mi baldaŭ komencis verki en la lingvo, unue poemojn. Mi havas longan verkistan karieron ankaŭ en la islanda lingvo, sed mia Esperanta verkisteco estas al mi pli kara.

Mia sperto de lernado de Esperanto estas simple la jena: Nenio povas anstataŭi intereson, jes entuziasmon, en lernado de lingvo. Mi ne havis instruiston, mi lernis la lingvon en izoleco, per lernolibro malgranda, gramatike kaj literature orientita, malnaiva, fidanta al plena sindediĉo de la lernanto. Kaj mi emas kredi, ke ĝuste tia lernolibro estas la plej taŭga por subteni la intereson per sinsekve rapidaj kaj senhalte pliaj postuloj ĝis la klare antaŭvidebla fino. Tia estis la lernolibro de Th. Cart kaj tion atestis la multaj tradukoj de ĝi en aliajn lingvojn, i.a. la islandan. Kaj feliĉe estis tia libro, kiu trafis en miajn junulajn manojn antaŭ pli ol kvindek jaroj.

de **Baldur Ragnarsson**

Omaĝe al Baldur Ragnarsson  
Fonto "Komencanto", nr. 5, 2005

## ... mia esperanta verkisteco estas al mi pli kara

**M**ian knabaĝon mi pasigis en vilaĝo ĉe unu el la multaj fjordoj, kiuj tranĉas la bordojn de Orienta Islando. Ambaŭflanke de tiu fjordo altaj montoj levas siajn pintojn al la ĉielo. La fjordo mem estas profunda kaj riĉa je fiŝoj. La infanoj vivis libere, grimpane sur la deklivoj de la montoj aŭ hokante fiŝetojn de sur la multaj lignaj varfoj dise starantaj laŭlonge de la vilaĝa bordo. Ili ankaŭ frue partoprenis la laborojn de la plenkreskuloj, precipe dum la somero. Dum la vintro ili kompreneble devis ĉeesti la lernejon, la solan en la vilaĝo.

En tiu lernejo instruis mia patro. Kaj, ĉar li estis homo edukita, li devis ankaŭ okupi sin pri diversaj aliaj aferoj de kulturo. Li prizorgis la komunan bibliotekon, aranĝis teatraĵojn, faris paroladojn je solenaĵoj. Li edukigis en la Pedagogia Lernejo en la ĉefurbo Rejkjaviko. Unu el liaj kunstudantoj tie estis fervora esperantisto. Li havis la kutimon saluti la kunulojn matene en Esperanto: "Bonan tagon!". Tion diris al mi mia patro. Dudek jarojn poste mi havis la okazon paroli kun tiu homo, tiam estro de duagrada lernejo. Li ne forgesis sian Esperanton, sed estis tro okupita por partopreni aktivadon por la lingvo. Mi diris al li mian ekkoniĝon kun Esperanto pere de lia siatempa "Bonan tagon"-saluto. Tio lin amuzis kaj ĝojigis.

En mia hejma vilaĝo estis ŝuisto, kiu tenis malgrandan librovendejon en ĉambro apud sia laborejo. Tie inter popularaj romanoj, biografiaj libroj kaj tradiciaj poemaroj mi trovis lernolibron de Esperanto. Ĝi enhavis mallongan gramatikon en la islanda lingvo sen ekzercoj kaj legmaterialon. Mi aĉetis tiun libron pro scivolemo kaj eble kun iom neklara intenco ĝin iam trastudi. Tiam mi havis 14 jarojn. Sekvis du jaroj en duagrada lernejo. La tempo por Esperanto ankoraŭ ne venis.

Kaj jen mi trovis min en Akureyri, urbo en Norda Islando. Unuajara gimnaziano. Lun tagon mi rimarkis en montrofenestro de librovendejo libron kies titolo tuj frapis min rememorige pri mia knabaĝa intereso. Mi eniris kaj petis permeson rigardi la libron. Mi tuj konstatis, ke mi tenis ion eksterordinaran en la mano: la unuan lernolibron de Esperanto en la islanda lingvo, eldonitan en 1909. Temis pri libro bazita sur la fama lernolibro de Théophile Cart "L'esperanto en dix leçons - Esperanto en dek lecionoj" (1902). La islanda versio, farita de Thorsteinn Thorsteinsson, pioniro de Esperanto en Islando (1880-1979), estis iom pli ampleksa ol la originalo, havanta 12 lecionojn kaj sufiĉe detalan Esperantan-islandan vortaron. Kompreneble mi aĉetis la libron, neniel antaŭsentante, kiom multe ĝi influos mian vivon.

Dum la sekvanta somero mi laboris kiel ordinara voj-laboristo en certa valo en montara regiono en Orienta Islando. Ni estis kune dudek homoj kaj loĝis en tendoj. Mi kunportis mian lernolibron de Esperanto kaj komencis ĝin studi en la vesperoj post la taglaboro. Mia kuntendano estis homo, tridek jarojn pli aĝa ol mi, bonkorulo, kiu tre respektis mian "edukitecon", preparis mian kafon kaj plenumis ĉiujn farenaĵojn de nia komuna tendara vivo, iusence mi povas danki al li la senzorgan cirkonstancon de mia Esperanto-lernado. Preskaŭ tuj mi estis tiom kaptita de la lingvo, ke mi uzis duonon de la tagmeza manĝopaŭzo por lernado, mi ankaŭ kunportis la libron en mia poŝo al la laboro kaj legis kelkajn frazojn en paŭzoj, kiuj ofte doniĝis.

Kiel supozeble tia dinamika metodo, motivita kaj motorita de entuziasmo pri la lingvo mem, nepre donas rapidajn rezultojn: en la aŭtuno post kelksemajna studo mi jam komencis korespondi kun eksterlanda esperantisto, svisa poŝtisto, kies nomon mi hazarde trovis. Kaj ne nur tio. Ege grava por mi estis preskaŭ tuja kontakto kun la frua periodo de la lingvo. Tiel estis, ke mia antaŭa instruisto en la duagrada lernejo, informita de mia patro pri miaj Esperanto-studoj, sendis al mi kelkajn librojn el la postlasitaj posedaĵoj de bona laboristo, kiu ĵus mortis. Tiu homo estis unu el la plej fruaj esperantistoj en Islando kaj abonis revuojn kaj mendis librojn el eksterlando. Inter tiuj estis binditaj jarkolektoj de la revuoj "Lingvo internacia" kaj "Juna esperantisto", la poemaro "El parnaso de popoloj" de Grabowski kaj "Estu homo!", traduko el la franca de Samuel Meyer. Pri tiu laste menciita mi havas belan memoraĵon. Kutime ni, la vojlaboristoj, veturis sabate hejmen kaj reiris al la envala tendaro dimanĉe vespere. Ni veturis per ŝarĝaŭtomobilo, sidantaj sur sendorsaj benkoj en ŝirmejo fiksita sur la platplanko de la aŭto. Estis libera loko malantaŭ la ŝirmejo kaj tie ni, la junuloj, ofte sidis por amuzo sur la plankfino. Tiel okazis, ke dum la aŭto transveturis malgrandan, senpontan rivereton mi, sidanta sur tiu riska loko, tiam legante la libron "Estu homo!", subite ĝin perdis el la mano en la rivereton. Mi tuj kriis al la ŝoforo, ke li haltigu la aŭton, kion li faris, ektimante ke okazis akcidento. Feliĉe ne estis tiel, mi ensaltis la rivereton kaj elsavis la libron, nur iomete malsekan. Ankoraŭ hodiaŭ mi konservas tiun libron, ĝi montras ankoraŭ frontpaĝe la signon pri tiu aventuro. Ĉiuj tiuj libroj devenas el la jaroj 1912 - 1913. Jen do >> 6



**E**n la praaj epokoj en kiuj ni, kune, vagadas ofte, pere de miaj rakontoj, la antikvaj homoj ne estis arogantaj kiel la nuntempaj. Ĉi-tempe, senpripense kaj egoisme, ni kredas, ke ĉio oferata al ni de la vivo kaj la naturo, memevidente estas nia rajta propraĵo, io laŭmore ŝuldata al ni. Tamen, tiuj prauloj, provataj ĉiumomente en malfacilaj vivkondiĉoj, estis modestaj, ili sciis, ke ĉio oferata al ili estas donaco, unu ankoraŭ dankinda donaco de la dioj. Por ekzemplo, tio, ke ĉiutage mateniĝas kaj noktiĝas, ke estiĝas lumo kaj mallumo, estis por ili ne io memkomprenebla, ne io nepra aŭ fizika. La antikvuloj sciis, ke tio povas okazi aŭ ne okazi, ke tio dependas de la bonvolo kaj bonhumoro de la plej amata al ĉiuj vivantaj estaĵoj dio, de Helio, konata al la nehelena mondo kun la nomo Suno. Kaj jen, tiklas min la donita okazo, rakonti ion pri tiu brila dio.



Helio estis ĝustedirate brila! Li estis la lumo- kaj varmodona dio, alivorte la vivodona dio, kiu, per siaj valoraj donacoj, ŝanĝis ĉion sur la tero. Antaŭe, en la epoko de Ĥaoso (Χάος), ĉiuj vivaĵoj, blinde baraktadis en mallumo kaj malvarmo, ĝis kiam venis la mastro de la mondo, Zeŭso (Ζεύς) kun la Olimpaj dioj kaj ties helpantaj bonfaraj diaĵoj, kiuj longe militis kontraŭ ĉiaj monstroj kaj hororaĵoj, venkis la lastajn siajn malamikojn, la terurajn Titanojn (Τιτάνες) kaj la Gigantojn (Γίγαντες) kaj stabiligis sian absolutan potencon super la tuta mondo. Kiam ĉio estis bonrezulte finita, Helio kaj lia fratino Selena (Σελήνη), konata al la nehelena mondo kun la nomo Luno, dividis inter si la tempon; la unu alportas al la mondo la lumon, li signalas la vekigiĝon kaj vigliĝon de la naturo, kaj la dua alportas la mallumon kaj kune, la ripozon kaj serenen.

Helio surportas blindig-brilan ĥitonon el pura lumo kaj kronon aŭ kaskon tiom brilantan, ke se mortema estaĵo povus ĝin ekrigardi, tuj ĝi forbrulus. Ĉiun tagon, la granda dio komencas sian veturadon per sia grandioza, tute ora kaj flamanta ĉaro, tirata de kvar

splendaj, senmortaj, flugilhavaj ĉevaloj, kiuj obeas nur al la kondukado de sia mastro. La brila, lumodona dio tenas grandan, oran pafarkon, per kiu senĉese li ekĵetas siajn sagojn, siajn brilajn sunradiojn, per kiuj li batas kaj forpelas mallumon, nubaron, nebulon, kaj malvarmon. Lia itinero estas ĉiam la sama; li ekiras el la ekstrema oriento de la senlima maro, la reĝejo de la granda dio Oceano (Ωκεανός), kiu ĉirkaŭas la teron, kaj li finatingas la ekstreman okcidenton, la finpunkton de sia veturado. En ambaŭ punktoj, en tiu de sia ekiro kaj en tiu de sia alveno, Helio havas po unu brila palaco. En la unu li ripozas kaj dormas kaj dum lia dormo li estas kondukata per granda ora taso al la dua, en kiu li vekigiĝas kaj ekiras. Helion fidele kaj akurate sekvas lia pli juna fratino, Selena, kiu iom-post-iome estingas la lumon de sia frato kaj sternas la mallumon kaj la kvietecon sur la tero.

Estas kompreneble, ke la granda dio estis tre okupita, tamen, tio ne malhelpis lin konduki kiel la ceteraj dioj, precipe en la kampo de la amaferoj. Kiel ĉiuj helenaj dioj, kiuj per sia ekzemplo stimulis la mortemulojn esti ĉiam kiel eble plej aktivaj en la amorilatoj, por esti ĉiam multenombra la homa genro, ankaŭ Helio havis siajn amaventurojn kaj siajn plej varmajn kaj plej pasiajn amhistoriojn. Li ekamis multajn virinojn, li kuniĝis kun ankoraŭ pli multaj, sed lian koron tre firme kaj tre longe okupis du virinoj. La unua estis Rodosa (Ρόδος), filino de la diino de la amo Afrodita (Αφροδίτη), do, kompreneble junulino ekstreme bela, amor-sperta kaj alloga. Kiam, post la definitiva sia venko super ĉiuj malamikoj, la dioj, invitive de Zeŭso, kolektiĝis por diskuti pri la disdivido de la mondo, Helio, senĉese okupita, ne ĉeestis la kunvenon. Kiam ĉio estis finita, kiam la mondo estis dividita, Zeŭso informiĝis pri la foresto de sia amata kamarado kaj decidis nuligi la decidojn kaj rezultojn de la unua kunveno kaj inviti la diojn al nova kunsido, kiun nepre partoprenus ankaŭ la brila dio. Tamen, la bonkora kaj modesta Helio ne akceptis tion, li certigis la direĝon, ke li deziras nur tion, elekti kaj akiri unu nur insulon. Kompreneble, la modesta peto estis tuje kontentigita kaj Helio elektis, eble la plej belan helenan insulon, li donacis ĝin al sia amatino kaj donis al ĝi ties nomon. Temas pri la belega insulo Rodoso (aŭ Rodiso), konata ĝis nun ankaŭ kun la alnomo "suninsulo", ĉar ĝi estas, dum preskaŭ la tuta jaro, sunplena, malavare banata de la vivodona suna lumo. Nur malmultaj el la loĝantoj kaj el la milionoj da vizitantoj de la belega insulo scias, ke ĝia beleco kaj





ĝia karakteriza heleco restas ĉiam nemoderigeblaj kaj sensanĝaj, ĉar, malgraŭ tio, ke la mondo kaj la tempoj ŝanĝiĝis, la eterna granda dio ĉiam zorgas pri sia amata insulo kaj pri sia amata virino.

La dua tre kara amatino de Helio estis Klimena (Κλυμένη), oceanidino, do, unu el la multaj filinoj de Oceano. Ŝi estis edzino de Meropso (Μέροψ), reĝo de Etiopujo (Αιθιοπία), sed, per sia milda, dolĉa karaktero, per sia eksterordinara beleco kaj ĉarmo, per sia tuta aminda aspekto kaj teniĝo sukcesis ŝteli la ameman koron de la bona dio. Kelkaj homoj diradis, ke ĉiun tagmezon, el la etiopa ĉielo estis aŭdata ia, kvazaŭ ekstertera, apenaŭa, obtuza tintinado, ia stranga sonsignalo. Tion tamen povis aŭdi nur tre malmultaj homoj, precipe enamiĝintaj gejunuloj, sed la pli multaj homoj sciis kaj kun certeco diradis, ke la suno pasadis treege lante super Etiopujo, ke en tiu lando la tago estis pli hela, pli varma kaj pli longa. Komprenoble, la allogita dio deziris resti kiel eble plej longe apud sia kara amorantino, kun kiu ĉiutage li sekskuniĝis, mi ne scias kiamaniere, kaj tiele li akiris de ŝi filon, al kiu estis donita la nomo Faetono.



Komprenoble, la granda dio, kiel ĉiuj liaj dioj-kamaradoj, havis multajn gefilojn, tamen, tiu Faetono, la unua frukto de lia kuniĝo kun tiu, tre amata, favorata virino, ĝuis la apartan amon, atenton kaj zorgon de lia patro. Ĉio okazis de malproksime, ĉar, komprenoble, mortemulo ne povis stari apud la brila dio. De malproksime, do, Helio atentis sian plej amatan filon, kies prizorgon havis ne nur ties patrino, sed ankaŭ multaj el liaj fratinoj, filinoj de Helio kaj pro tio alnomataj heliidinoj (Ηλιαίδες).

Faetono bonege grandiĝadis, en etoso de plena amo kaj prizorgo kaj iĝis viro tre bela, nobla kaj brava. Li havis ĉion, tamen li estis preskaŭ malfeliĉa, ĉar lin turmentis neeksplikebla, pasia deziro, renkonti kaj ekkoni sian patron. Li ne kaŝis sian fierecon pri sia dideveno kaj li ne ĉesis paroli pri tio al siaj amikoj kaj kolegoj, multaj el kiuj iam komencis kontesti liajn parolojn kaj lin mokadi pro lia insistado. Aldoniĝis, do,

nova kialo por lia malkontenteco, lia kroma deziro pruvi sian devenon al siaj kunuloj. Lia patrino kaj liaj fratinoj klopodadis ekspliki al li, ke lia deziro ne povas esti kontentigita; ili faris ĉion por lin konvinki resti trankvila, ne peti multon, sed tute vane. Klimena estis tiom malespera pro la malbona stato de sia valora, sola filo, ke ŝi komencis, per komplimentoj, karesoj, kisoj, petegoj, sed ankaŭ per plendoj kaj larmoj kaj per ĉiaj virinaj allogaĵoj kaj artifikoj konvinki Helion kontentigi la deziron de sia filo, do, inviti kaj akcepti lin en sia palaco. La kortusiĝema dio ĉion povis alfronti kaj elteni, krom la virinaj larmoj, precipe larmoj de tiu, tiom amata virino. Li klopodis ekspliki al sia amatino kiom malfacila, eĉ danĝera afero estus por la junulo tia renkontiĝo, tamen tio kaŭzis ankoraŭ pli multajn larmojn kaj veojn, kiuj venene pikis la molan koron de la dio. Nu, li povis fari nenion, krom cedi, do, finfine li invitis sian filon al sia palaco!

Helio akceptis Faetonon en la granda salono de la brila palaco, sidante sur sia grandioza, ora trono, tamen antaŭe li demetis kaj kaŝis sian blindig-brilan kronon, kiun mortemaj okuloj ne povis rigardi, kaj petis de sia fratino, Selena, ŝpruce ŝetadi iom da ombro, iom da mallumo sur lin, por iom moderigi la brilon de lia danĝere luma ĥitono. Tiele, Faetono povis sekure sidi, ne tre proksime, tamen antaŭ sia patro, al kiu plenĝoje, fiere kaj kuraĝe komencis paroli kaj rakonti ĉion pri sia vivo, pri siaj okupoj, revoj, planoj, deziroj. Ŝajnas, ke Faetono posedis multon el la beleco kaj ĉarmo de sia patrino, ĉar post nelonge la dio estis konkerita de lia plaĉa, gracidotita filo. Li, do, diris al Faetono, ke li intencas fari al li grandan, didecan donacon, kiun li povos fiere montri al siaj amikoj kaj demandis lin kion plej multe li deziras. Faetono ne hezitis peti de sia patro perĵuran promeson, ke li nepre donos al li ĉion ajn kion li petos. La dio, admirante la kuraĝon de sia filo, promesis, ĵurinte per Stikso (Στυξ), la nigre terura dio-rivero, fluanta al Hadeso (Αδης), la mondo de la mortintoj. Tiam, Faetono, kun naiva impertenteco, petis de sia patro, ke li permesu al li konduki la dian ĉaron sur la ĉiutaga itinero de la dio. Helio ege surpriziĝis, li ne atendis tian ekstreman postulon, li eksplikis al sia filo ke ne nur homo, sed nek dio povus konduki lian ĉaron, li, do, petis de li ŝanĝi opinion, peti ion alian. Faetono, verŝajne tirate de ia neeksplikebla demona influo, malgraŭ la insistaj konsiloj eĉ petegoj de lia patro, ne cedis, kaj la granda dio, por la unua fojo en la eterno, sentis sin tute malforta, ĉar juro per la nomo de la terura Stikso povis esti rompita aŭ malplenumita nek de homo nek de dio. Kun granda doloro, la patro cedis al la neŝanĝebla, obstina postulo de la senpripensa junulo. Li kondukis lin ĉe la ĉaro, li senespere donis siajn gvidojn, li

konsilis lin, tute ne tiri la bridojn, tute ne krei al la ĉevaloj, stari sur la ĉaro kiel eble plej senmova kaj silenta.



Faetono, ne povante reteni sian ĝojon, ekiris, kaj kiam la ĉaro supreniris, kiam li vidis la teron de supre, tuj forgesis la patrajn timojn kaj konsilojn, plena je entuziasmo kaj fervoro li komencis agi, kvazaŭ li kondukus ordinaran ĉaron. La flugilaj ĉevaloj, tuj kiam ili eksentis ke fremdaj manoj tenas la bridojn, ke fremda persono kondukas ilin, ili perdis sian memregecon, ili forlasis sian ordinaran itineron, ili komencis freneze flugbaraktadi supren kaj malsupren, en diversajn direktojn, ili alproksimiĝis, preskaŭ tuŝis la teron kaj tuj poste ili leviĝis alten ĝis la plej supraj ĉieltavoloj. Kaj ĉiufoje kiam la ĉaro alproksimiĝis al la tero, ĉio ekflamis; urboj, vilaĝoj, arbaroj, kampoj, ĉio forbrulis, la fontoj kaj rojoj sekiĝis, la riveroj, la lagoj, la maro ekbolis, kaj ĉiufoje kiam la ĉaro malproksimiĝis kaj leviĝis super la ĉiel-bluo, ĉio sur la tero frostiĝis kovriĝis de nepenetrebla glacio. Tio daŭris nelonge, tamen la perdiĝo de la natura ekvilibro estis videbla, la tuta katastrofo de la mondo estis certa, kaj Helio, kiu tuj rimarkis la danĝeran malordon kiun senvole li kaŭzis, komencis plengorĝe ekkrii, tiel, ke li estis aŭdita de la dioj, en la supro de Olimpo (Όλυμπος). Kun granda animdoloro, Helio petis de Zeŭso meti finon al tiu katastrofo kaj la reĝo de la dioj, konsciante la gravecon de la situacio, ĵetis unu el siaj ĉiodetruantaj fulmoj. La dia fulmo trafis Faetonon, kiu tuj falis morta. La saman momenton la ĉevaloj, liberiĝinte je la fremda pezo, retrovis sian ekvilibron, trankvile ili daŭrigis sian flug-galopon kaj la katastrofo estis evitita.

Faetono falis ĉe la bordoj de Eridano (Ηριδανός), la itala rivero, nuntempe nomata Pado. Tie, tuj kuris la heliidinoj, la karaj fratinoj de la mortinto, kiuj, lamentante levis kaj prizorgis la kadavron de sia amata frato, ili ĝin enterigis, ĝuste tie, kie Faetono falis, ĉe la bordoj de la rivero. Oni diradis, ke la lamentantaj junulinoj aliformiĝis en sveltajn arbojn kaj

tiele ekaperis la belaj salikoj, kiuj vice staras ĉe la riverbordoj, kun siaj branĉoj ĉiam kliniĝantaj al la tero, kaj ĉiam ploras pro la pereco de la amata, neprudenta junulo. Estas pro tio, ke la Helenoj nomas la salikojn ankaŭ "plorantinoj" (κλαίουσες), ekzakte pro tio, pro ilia senĉesa, eterna plorado. Oni krome diradis, ke la larmoj de la heliidinoj kaj de Klimena, falinte surteren, formis la sukconon, kiu, en diafanaj, divers-grandaj gutoj, abundas en la bordoj de Eridano.

La tia, drama fino de la terura aventuro kaj la morto de lia amata filo, krude emociis, forte skuis kaj ŝokis la noblan animon de Helio, la bonkora, ĉiam bonfaranta dio. Li falis en preskaŭ homan, profundan desperon, tiel, ke li povis nek sian ĉiutagan taskon plenumi. Pro tio, por la unua kaj sola ĝis nun fojo, unu tagon ne mateniĝis, la suno ne aperis kaj la nokto daŭris du diurnojn. Tia estis la funebro de la brila dio, kies doloron, eĉ la reĝo de la mondo, Zeŭso, respektis kaj partoprenis. Tiel, honore al la diamata, flamiĝema, ard-kora, sed malsaĝa junulo, la dioj metis brilan stelon sur la ĉielon, al kiu ili donis la nomon Faetono, kiu pli poste estis ŝanĝita al Koĉero (Ηβίριος). Kaj por danki la grandan riveron, kiu akceptis en siaj bordoj la korpon de la dibenita junulo, la dioj metis ankoraŭ unu brilan stelon sur la ĉielon, al kiu ili donis la nomon Eridano.

Nu, al tiuj, kiuj eble dubas pri la vereco de tiu ĉi mia rakonto, mi montras la ĉielon. Tie staras du tre seriozaj, eternaj atestantoj de mia pravo. Kiu, do, povas, kiu aŭdacas kontraŭstari al du tiom grandaj, tiom brilaj kaj signifaj konstelacioj?

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

### Hahaŭ kun Andreo per Esperanto



André Grossmann tre ŝatas rakonti ŝercojn, spritaĵojn. Jen li en la 51a ILEI-Kongreso okazanta en Madrido en junio de 2018.

<https://youtu.be/-Az32AAzmOI>

## 1

Lia edzino telefonis al Sulejman

— La parolanto estas mi,  
mi, Fahire.

Ĉu vi ne rekonis min de mia voĉo?  
Do eble mi tro laŭte parolis al vi subite.  
Ĉu krio?

Eble...

Ne,

la infanoj ne estas malsanaj.

Aŭskultu min :

Forlasu vian laboron kaj venu,  
sed rapide.

Mi ne povas diri tion al vi sur la telefono,  
ne eblas.

Ankoraŭ estas tro da tempo ĝis vespero.

Horoj, horoj,  
apokalipsaj.

Nenion demandu.

Aŭskultu min...

Se vi ne tuj trovos pramon  
transiĝu al Uskudar <sup>1</sup> per remboato.

Alsaltu al taksion kaj venu.

Se vi ne havas monon

prenu iom de via estro.

Nenion pensu dum la vojo,

Provu veni kiel eble sen mensogoj.

Mensogojn oni diras al fortuloj,

mi estas senforta.

Ne moku min mia senspertulo.

Jes oni atendas neĝon,

jes,

la vetero bonas.

Kiel viro kun kiu mi amindumas,

ne kiel mia edzo,

sed kiel mia grandulo, mia inteligentulo,

kiel mia patro venu...

## 2

Alvenis Sulejman,

Fahire demandis al sia edzo Sulejman :

— Ĉu tio veras?

— Jes.

— Dankon Sulejman.

Jen, mi nun trankviliĝis.

Jen vidu, mi ne plu ploras.

Kie vi estis renkontiĝantaj?

— En iu hotelo.

— Ĉu en la flanko de Bejoglu? <sup>2</sup>

— Jes.

— Kiom da fojoj?

— Tri aŭ kvar.

— Ĉu tri aŭ ĉu kvar?

— Mi ne scias.

— Ĉu tiom malfacilas rememori tion Sulejman?

— Mi ne scias.

— Do, en iu hotelĉambro.

Kiu scias, kiom malpuraj estis la littukoj.

En iu angla romano mi legis pri tio,

en hoteloj por tiu celo

troviĝas rompitaĵ bankuvoj.

Ĉu estis ankaŭ la sama en via hotelo Sulejman?

— Mi ne scias.

— Provu rememori tion,

ĉu rompita bankuvo kun rozpolv-koloraj floroj?

— Jes

— Ĉu vi ion donacis al ŝi?

— Ne.

— Ĉu eble ĉokoladon, aŭ ion alian?

— Nur unu foje.

— Ĉu vi ŝin tiom amis?

— Ĉu ami?

Ne...

— Ĉu estis aliaj Sulejman?

— Ne.

— Ĉu ne estis?

— Ne.

— Do, vi tiun amis...

Se estus aliaj,

tio min trankviliĝus...

Ĉu ŝi amindumis tiel bone?

— Ne.

— Diru al mi la veron, jen kiom kuraĝa mi estas...

— Mi ja diras la veron...

— Oni jam montris ŝin al mi.

Virino kiel bovino.

Ŝiaj kruroj pli dikaj ol mia talio...

Sed tio estas afero de gusto...

Plua demando, Sulejman :

Kial?

— Mi ne scias...

En la mallumo je la nivelo de la fenestro  
iu neĝkovrita, peza branĉo de abio.

Pasis konsiderinda tempo ekde kiam

la murhorloĝo en la halo sonoris la 12-an.



La edzino de Sulejman, Fahire  
 La jenajn diris al li la postan tagon.  
 — ... Estis ne eltenebla doloro  
 la kompato mi sentis por mi,  
 mi decidis mortigi min, Sulejman...  
 Mia patrino, miaj infanoj kaj ĉefe vi  
 malkovrus miajn piedspurojn sur la neĝo.  
 La gvardisto, la policistoj, unu ligna ŝtupetaro  
 kaj virinan korpson vi eltirus  
 el la ĝardenputo de la malantaŭa terpeco.  
 Ĉu tiel facilas?  
 Piediri al la ĝardenputo noktomeze,  
 poste grimpi kaj stari en la rando de ĝi  
 kaj fali en ĝia mallumo kaposuben?

Sed se vi ne trovus mian  
 piedspurojn sur la neĝo,  
 ne nur pro mia timo,  
 sed la gvardisto, policistoj, ŝtupetaro,  
 onidiroj, insultado,  
 memortigo de trompita edzino :  
 amuza afero.  
 Rakonti pro kio mi mortis estus malfacile.  
 Al kiu? Al ĉiuj, ekzemple al vi.  
 Homo, eĉ decidante memortigi sin  
 pensas pri aliaj homoj...

Vi estis dormanta en la lito  
 via vizaĝo trankvila,  
 dormante kiel ĉiam,  
 antaŭ kaj post tio.

Komencis neĝi ekstere.  
 Eliri al la balkono dum nur unu nokto :  
 Pneŭmonio la postan tagon,  
 ekmorti sen manifestacio.  
 Ne,  
 Ne venis al mia kapo eĉ la ebleco de kataro.

Mi ekbruligis nian fajrujon.  
 Unue oni devas senti sin varme.  
 La pulmo rompiĝas kiel teo-glaso.  
 Mi rigardis al la fenestro, al la neĝo :  
 « Birdo kiu perdis sian kunulon  
 kiel neĝo  
 dum tagoj atendas printempon... »  
 Mia patro tre ŝatis tiun poemon.  
 Vi ne ŝatas ĝin.  
 «De flanko al flanko, tremante, kaj fuĝante... »

Ne estingante la lampon mi eliris al la balkono  
 « ... kiel neĝo  
 faladas, ploras... »  
 Mi sidiĝis sur la seĝo en la balkono.  
 Senbrueta la aero.  
 Mallumo sed plenblanka.  
 Mi kvazaŭ endormiĝis.  
 Kvazaŭ homo kiun mi amas  
 timante vekti min  
 tenere piedpaŝis ĉirkaŭ mi.  
 Mi ne sentis malvarme.  
 Mia sorto fondiĝis,  
 klariĝis.  
 La lumo elfalanta el la balkonpordo  
 falis kiel varma ŝtofo sur miaj genuoj.  
 Mi en letargia malgajeco  
 strangajn aferojn pripensis:  
 La sikomoro-arbo en Fenerjolu<sup>3</sup> estas 150 jaraĝa.  
 Insektoj kies vivdaŭro estas nur unu tago.  
 Tempo venos,  
 kiam homoj vivos  
 longe kaj tre feliĉe.  
 Homo havas koron kaj kapon...  
 La manoj de homo...  
 Homo?  
 De kiu tempo,  
 de kie,  
 de kiu klaso?  
 Iliaj homoj,  
 niaj homoj.  
 Kaj tamen ĉio ĉi,  
 batalo por iu nova mondo.  
 Poste vi,  
 mi,  
 iu rompita bankuvo  
 kaj la kompato  
 mi sentas pri mi mem.

Neĝo ekhaltis.  
 Tagiĝo alproksimiĝis.  
 Kun honto  
 mi revenis al la ĉambro.  
 Se vi tiam vekigis,  
 mi brakumante sur via kolo...  
 Sed vi ne vekigis.  
 Jes,  
 danke, ke mi eĉ ne havas kataron.

Nun, kio?  
 Mi de tempo al tempo rememoros,  
 de tempo al tempo forgesos tion.  
 Ni denove vivos kune  
 estante certa, ke vi amas min.

Pasis preskaŭ ses monatoj.  
 lunokte la geedzoj estis revenantaj el la maro.  
 Steloj estis sur la ĉielo, someraj fruktoj sur la arboj.  
 Fahire subite haltis,  
 rigardis al liaj okuloj ameme  
 kaj frapegis lian vizaĝon kvazaŭ kraĉante sur ĝi.

**Nazim Hikmet Ran** <sup>4</sup>  
**16.8.1940**



<sup>1</sup> *Uskudar* : distrikto en la azia parto de Istanbul .

<sup>2</sup> *Bejoglu* : kvartalo en la eŭropa parto de Istanbul iam fama pri amuzejoj.

<sup>3</sup> *Fenerjolu* : kvartalo en Kadikoj distrikto en la azia parto de Istanbul.

<sup>4</sup> *Por pli da informoj pri Nazim Hikmet Ran legu ĉe:*  
<https://esperantoturkiye.wordpress.com/2017/05/17/poezio-de-nazim-hikmet-ran/>

tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkujo

**\*\*\* Dua premio en la branĉo poezio ĉe la "Lucija Borĉić 2018" Tradukkonkurso de la Kroata Esperantista Unuiĝo \*\*\***

## La fipovruloj

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

### Rakonto de **Adil Olluri**, el Albanujo

**L**a brilo de ĉi tiu prestiĝa festivalo furoris kaj li estis piedpremante sur lia ruĝa tapiŝo. Li moviĝis malrapide, kvazaŭ stuporite pro la sorĉo, numure por ĝuadi tiun gloraĵon. Sur tiu tapiŝo, tiel multe revita de la reĝisoroj de nia eta lando, la piedoj de la junulo, Endrit Garaj, estis la unuaj paŝantaj venkeme.

Lin oni fotadis de ĉiuj flankoj. Lian nomon li aŭdis menciante laŭtvoĉe de multaj buŝoj, ĉeestantaj en la korto, noblece aranĝita, de tiu palaco, kie oni apenaŭ povus aŭdi aŭ vidi ion alian, krom la flatajn ovaciojn kaj la lumtrembrilon, pliiĝantaj la gajecon. Li ne kredis al la vortoj aŭditaj kaj la vidaĵoj spektitaj, supozante, komence, ĉu li estis drogita aŭ envere estis enirante en la pordojn de la paradizo. Ne estis li la unua, nek la dua. Oni spektigos sian filmon en ĉi tiu areno tutmonda kaj li sin mezurus kun la plej renomaj majstroj de ĉi tiu arto.

\*\*\*

Endrit bonŝancis finstudi en lando, kies mapo similis al la koro, sed kies homoj estis tiel malbonanimaj kaj enviaj ke, de tago al tago, ili estis nigriginte lian vivon, estis bremsinte la ties ritmon, kovrante la sunon por ke neniu vidu lin, pensante ke, ĉar ili mem suferas pro reŭmatismo, ĝiaj radioj ne devus varmigi iun ajn. Simple, ili estis sufokinta la landon, kaj plipeziginta la teron per siaj grasigitaj korpoj.

De tago al tago, li ekkonvinkiĝis ke nenion estis

lerninta de siaj renomaj kaj grandorgojlaj profesoroj, kiuj kutimis nur sin glorigu kaj ensorĉi siajn duonklerajn studentamasojn, scipovantaj nur pleniĝi iliajn notlibretojn, sed la kapojn lasi ĉiam malplenaj. Endrit estis la sola kiu ne laŭdis la profesorojn, de horo al horo, kiamfoje li renkontiĝis kun ili, kiel ili dezirus, eĉ kelkfoje dum la lecionoj li elmontris signojn de malaprobo, kio tute ne plaĉis al ili.

La triopo de la granduloj: Gani Alushi, kiu neniam spektis fremdajn filmojn, Abedin Konjuhi, parolinta nur pri historio kaj sia teorio, ne farante iam ja tian, kaj Enver Qerreti, la plej juna el profesoroj, kiu faris nenion alian, ol jesigi per kapmovoj la vortojn de la du unuaj, malbonopiniis pri la ribeliĝinta studento kaj punis lin kie ajn ili povis.

\*\*\*

La tri musketjeroj ĉeestis en ĉiu jurio, estimanta kaj mondonanta por produkti filmojn. Kvankam Endrit sendadis ĉiamfoje dignajn sinopsojn, ili apenaŭ dignis trafolumi ilin kaj, ne leginte ion, forĵetis ilin en la rubujon. La samon ili faris dum longaj jaroj, sed li ne intencis halti. Helpis al li la onkloj, elmigrintaj antaŭ tri jardekoj en Germanio. Li, per malmulte da mono, produktis kurtajn filmojn, kiujn spektis kaj laŭdis ĉiuj tiuj, ŝatantaj la plej novan en la arto, inventita de la homo.

La triopo suferis pro liaj eksplodoj kaj la fakto ke li faris filmojn, ne prikonsiderante ilin. Komencis ili kalumnii, atribuante lin tutvariajn makulaĵojn, jen li estas tia, tia.

Tio ege lezis Endrit-on spirite dum longa tempo ĉar



la opinio de la triopo daŭre efikas al la cirkloj de la artistoj, scipovantaj aŭskultante kaj ne pensante. Tamen, li sufiĉe bone kapabliĝis kaj pludaŭrigis sian laboron por realigi sian revon: produkti longmetran filmon. Tio fariĝis jam palpebla, danke al la kunlaboro kun fremdaj filmproduktistoj.

\*\*\*

La sekto de la malicaj fipovruloj ne limigis sin per tiome. Ĝi estis tuŝinte lin en lia plej senteblo punkto. La plej juna de la triopo, Enver Qerreti, estis dirinta al Leonora, ankoraŭ dramaktora studentino, ke la

fremdulo paganta ŝian amaton por produkti la filmon estis ja sperta krimulo, malbonfama en la tuta mondo pro trafiko de knabinoj el malriĉaj landoj, kiel la nia. Ŝi, do, bonkondukta knabino, devus konsili al li tuj ĉesigi tiun kunlaboron kiu povus malhonorigi lin dum la tuta vivo. Tiel diris la profesoro trideksep jara, alparolanta al ŝi kiel plej granda bonanimulo por ilia longviva komuna feliĉo.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

## Kiu estas pli ruza?

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilniaus universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**  
el Litovio

-- oOo --

am iris homo tra arbaro kaj ekvidis sub la arbostumpo tordiĝantan kolubron. Spektinte la homon, la kolubro krias:

- Homo, helpu min. Mi rekompencos.

La homo obeis la kolubron. Li levis la arbostumpon kaj liberigis la kolubron.

- Pro via helpo mi rekompencos jene: mi pikos vin kaj vi sammomente mortos.

- Kion vi diras? – ektimis la homo. - Ĉu estas bono per malbono rekompencata?

- Kompreneble, -asertas la kolubro. – Ni povas iri kaj sciiĝi ĉe aliaj personoj kaj ĉiuj diros la samon.

- Nu, iru ni, - konsentis la homo. - Rekompenci per malbono pro farita bono povas nur stultulo, kaj saĝulo neniam tiel faros.

Iras ili kune kaj renkontas maljunan ĉevalon. La homo diras al li:

- Aŭskultu, vi estas maljuna kaj multon spertinta, do prijuĝu nian aferon. Mi trovis subpremitan kolubron kaj mi liberigis ĝin. Anstataŭ danko li volas piki min por ke mi mortu. Ĉu oni eblas rekompenci per malbono pro ricevita bono.

- Ĉiam bono estas rekompencata per malbono, - respondis la ĉevalo. – Kiam mi estis juna, mi tiradis lignan plugilon, haŭladis erpilon, portadis selon kaj trenis veturilon. Tiam mia mastro traktis min bone kaj nun, kiam mi plu ne kapablas labori, la mastro forpelis min el la hejmo.

## -- de ĵemajtaj fabeloj, el Litovio

La homo ekaŭdinte la ĉevalan parolon, ege malgajiĝis. Jen li vidas alkurantitan vulpon. La homo senprokraste ekkriis:

- Vulpeto, savu min el malfeliĉo.

- Kaj kia estas via malfeliĉo? - demandas la vulpo.

La homo tuj ĉion rakontis.

- Bone, - ekridis la vulpo. – Se vi promesas al mi sakon plenan da kokoj, mi savos vin.

- Mi promesas, promesas!

La vulpo aliris al la kolubro kaj diris:

- Iru ni, kaj vi montru la lokon, kie vi estis

subpremita. Mi devas ekvidi, antaŭ ol prijuĝi la aferon.

La kolubro tuj revenis al la sama loko, kie li estis antaŭe subpremita.

- Nu, mi nenion vidas. Ekkuŝu, por ke mi ekvidu, kiel ĉio okazis.

La kolubro ekkuŝis, kaj la homo, perceptinte, kio estas farenda, tuj ŝovis la stumpon sur li, kaj kune kun la vulpo foriris, postrestinte la jelpantan kolubron.

- Kaj nun iru kaj alportu al mi sakon plenan da kokoj, - diris la vulpo al la homo.

Tiu venis hejmen, plenigis sakon per hundoj kaj veturigis ilin. Alveturiginte, li diras al la vulpo:

- Vi petis min, ke mi portu la sakon, sed mi transportis ĝin al vi per veturigilo.

La vulpo pro ĝojo ekbatis la grundon pervoste kaj la homo dume elsakigis la hundojn. La vulpo ekkuris kaj la hundoj ekpersekutis ĝin. Konjektis la vulpo, ke ĝi ne eskapos de la hundoj kaj saltis en kavon. La hundoj kuradas ĉirkaŭ la kavo, sed povas nenion fari.

Kaj la vulpo sidas en la kavo, ĉiujn partojn de sia korpo kisadas kaj laŭdas ilin.

- Gambetoj, miaj gambetoj, kiel rapidege vi kuris. Oreletoj, orletoj miaj, bonege vi ĉion aŭdis. Okuletoj, vi ĉion sukcesis ekvidi. Nur vi, vosto, ĉion komplikigis kaj ĝenis la kuradon, dezirante fordoni min al la hundoj. Pro tio mi donos vin al la hundoj por ke ili disŝiru vin.

Kaj ĝi elnŝovis la voston por la hundoj. Kune kun la vosto ili elkavigis la vulpon kaj disŝiris ĝin.

## Mallonga Historio de Filozofio (38)



**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

**Vasil Kadifeli**

### Philippa Foot (1920–2010) kaj Judith Jarvis Thompson (1929– )



#### La senkontrola vagonaro kaj la nedezirata violonisto

**P**ensu pri iu senkontrola vagonaro, kiu iras al kvin laboristoj sur la fera vojo kaj estas nenio fari por haltigi ĝin. Tamen apud vi estas levilo per kiu vi povas direkti la vagonaron en alia direkto, kie troviĝas nur unu laboristo. Ĉu vi uzus la levilon? Ĉu la morto de unu laboristo estos pli bona ol la morto de kvin laboristoj? Eble ĝi ŝajnas esti pli bona alternativo ĉar tio savos la vivon de kvin homoj kontraŭ la morto de nur unu homo. Ĉi tiu estos ago kiu kreskigos feliĉon. Tamen decidi pri tio ne estas facile en la vivo.

Ĉi tiu estas la demando de angla filozofiino Philippa Foot. Kvankam en ĉi tiu ekzemplo estus akceptebla decidi mortigi unu laboriston por savi la vivon de kvin, en multaj aliaj okazaĵoj oni ne povas decidi oferi la vivon de unu homo por savi la vivojn de kvin. Pensu pri kvin homoj en la malsanulejo, kiuj baldaŭ mortos kaj kiuj senespere atendas transplanton de organoj (koro, hepato, reno ktp) kaj estas unu sana homo en a koridoro, kiun ni povas mortigi kaj dispecigi por preni la organojn kaj savi la vivon de la aliaj kvin. En la realo oni ne povas fari decidon mortigi la sanan homon por savi la vivon de kvin homoj kvankam eble ĉi tiu estas preskaŭ la sama ekzemplo kun la laboristoj sur la fervojo.

Sed en kiu situacio oni povas decidi pozitive al tia demando? Kelkaj pensas, ke ni ne povas roli kiel Dio, alia pensas, ke ni devas ŝanĝi la direkton de la

vagonaro. Tiuj estas pensaj ekzercoj. Alia ekzerco estas tiu de usona filozofiino Judith Jarvis Thompson: Ŝi reformis la demandon al io alia sed simila. Nun la vagonaro travojaĝas sur rekta linio. Sed vi estas sur ponto kie troviĝas dika homo kaj se vi lin puŝos malsupren povas esti, ke la vagonaro iomete malrapidiĝos kaj tiel la kvin laboristoj trovos kelkajn sekundojn dum kiuj ili eliros el la fera vojo kaj savos sin. En tiu kazo multaj respondos “ne” ĉar kvankam la du pensekzercoj estas similaj en ĉi tiu kazo oni pensas, ke puŝi la dikan viron malsupren estos murdo. La du ekzercoj ŝajnas tre similaj, tamen homoj konfuziĝas kaj kvankam kelkaj aprobus ŝanĝi la direkton de la vagonaro kaj mortigi alian homon, multaj el ili ne aprobus puŝi la dikan viron malsupren la ponto. Estas klare, ke en la dua ekzerco la afero malfacilas.

Kial homoj pensas tiel? Ĉi tiu estas la “regulo de duobla efiko”. Bati forte kaj eble mortigi homon, kiu provas mortigi vin, povas esti morala, tamen venenigi homon kiu planas mortigi vin ne estas morala. En la dua ekzistas “intenco”. Dum la Dua Mondmilito, kiam nazioj bombadis Londonon, la britoj havis agenton pere de kiu ili povus sendi malpravajn informojn kaj tiel trompi la naziojn por ke ili bombadi la sudan parton de la urbo, kiu estis malpli popolamasa kaj tiel savi pli da homoj, tamen la britoj decidis ne roli kiel Dio.

Filozofoj ankoraŭ provas solvi ĉi tiujn ekzercojn. Judith Jarvis Thompson metis plian ekzercon: “virino kiu gravediĝas kvankam ŝi uzas pilolon por malebligi tion, ne havas moralan devon naski la bebon”. Oni kutime taksas aborton surbaze de la fetu, sed oni devas fari tion surbaze de la vidpunkto de la virino. Nun pensu pri tio: iu matene vi vekiĝas en la malsanulejo kaj malkovras ke la kuracistoj jam ligis faman violoniston kun rena malsano al viaj renoj kun tuboj. Se vi tion ne volas kaj eltiras la tubojn kaj tiel mortigas la violoniston, tio estus tute morala afero. Sed kial la decido de la virino, kiu abortos la feton ne estu morala? La fetu estas same al la violonisto en ĉi tiu ekzemplo. Ĉu fetu estas persono aŭ ne, ĉi tiu ekzemplo montras ke la virino havas la rajton decidi pri sia korpo.

Ne ĉiuj pensas same, kaj tiaj pensekzercoj provas malkovri la kialojn, ke homoj havas konflikton sur la sama temo.

**(daŭrigota)**

## Ŝercoj



- Paĉjo, en la lernejo mi ne povis respondi al la demando, kie estas Afriko. Ĉu vi scias kie ĝi estas?

- Mi ne, sed bonvolu demandi vian panjon.

- Panjo, kie estas Afriko?

- Laŭ mi ĝi estas tute proksime, ĉar en nia fabriko laboras du afrikanoj kaj ĉiutage ili veturas per biciklo hejmen.

\* \* \*

- Karulino, ni geeziĝis antaŭ du tagoj kaj vi jam kverelas kontraŭ mi!

- Karulo, mi atendis ĉi tiun tagon dum du jaroj!

\* \* \*

Kuracisto ekzamenas la edzon kaj poste eliras kaj parolas al lia edzino:

- Via edzo ne plaĉas al mi...

- Ankaŭ al mi, doktoro, sed la infanoj tre amas lin...

\* \* \*

Geedzoj:

- Karulo, antaŭ la geedziĝo vi nomis min reĝino. Kio okazas nun?

- Nun mi fariĝis respublikano!



"Kio? Ĉu tiu malbenita, terure malbona mondo ankaŭ havas sian inferon?"  
*Umberto Eco*

## Krucvorttenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )


1. \_\_\_ martelo kaj amboso; 6. Por \_\_\_ kaj lerno ne sufiĉas eterno; 7. K; 8. luloken; 9. Hati (kontraŭo); 11. Konsonantoj de rido; 12. Nearbitra; 14. Azia

bordo de la Egea Maro.

### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

1. Konvolvulo; 2. Por sperto kaj lerno \_\_\_ sufiĉas eterno; 3. Du, \_\_\_, kvar; 4. Por sperto kaj lerno ne sufiĉas \_\_\_; 5. Havanta formon similan al sfero; 6. Elekzameni; 10. Nedifinitan; 13. Unua silaba de jida.

*(La solvo de la krucvorttenigmo troviĝas en la lasta paĝo)*



Fonto: Semajno de Enigmoj #3 <http://www.semajnodeenigmoj.com>

**17>>>** "La kovarduloj! La hundoj!" subite ekkriis Cirilo. "Pafi kuglon en lian dorson! La malbenitaj kamparanoj!... oni malmulte vipis vin dum nia tempo!..." Li montris sian pugnon al la maljuna virino kun iu malamo: "Ĉu vi aŭdas? Ĉu vi aŭdas?"

suferis..."

"Ha! Vi ne komprenas!"

"Estas pli bone tiel", ŝi rediris.

(daŭrigota)

"Mi aŭdas", ŝi diris, " sed kial do bedaŭri, ke li mortis tiel aŭ alimaniere? Dio akceptis lin sen la sakramentoj, tion mi vidis sur lia trankvila vizaĝo. Dio bonvolu doni al ĉiuj tiel kvietan finon!... Li vidis nenion, li ne

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio



## LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Tatjana Ivanovna ŝajnis abrupte antaŭsalti, kaj sur ŝia pala kvietita vizaĝo Jurij subite vidis esprimon tiom sovaĝan, tiom strangan, ke li tremetis kaj diris kun iu malespero:

"Lasu... Silentu, mi petegas vin. Lasu... ne gravas..."

Ŝi kriis sen aŭskulti lin, kun la manoj etenditaj kvazaŭ ungegoj:

"Ha! Malbenita diablo! Hundido! Ĉu vi kredas, ke mi ne vidas la pensojn en viaj okuloj? Kaj kiu estas vi por ordoni al via mastro?"

Li turnis al ŝi ŝanĝitan vizaĝon kun flagrantaj okuloj, ŝajnis kvietiĝi, kaj indiferente diris:

"Silentu, avino!... En la vilaĝo estas homoj, kiuj deziras vidi Jurijon Nikolajeviĉ, jen la tuto..."

"Ĉu vi almenaŭ scias, kion ili volas?" demandis Jurij. Subite li sentis sin laca, kun unu nura sincera kaj profunda deziro en sia koro: enlitiĝi kaj longe dormi... "Paroli kun vi pri la partigo de l' vino. Ni ricevis ordonon el Moskvo."

"Ha! do estas tiel!... Mi vidas, ke plaĉis al vi mia vino. Sed vi povus atendi ĝis morgaŭ, sciu!"

Li iris al la pordo kaj Ignat malantaŭ li.

Sur la sojlo li haltis.

Dum momento Ignat ŝajne hezitis kaj, subite, kun la sama movo per kiu li antaŭe ekprenis sian vipon, li movis la manon al sia zono, elŝovis la Mauser-on\*\* kaj dufoje pafis.

La unua kuglo trafis Jurijon inter la ŝultroj. Li eligis krimon pro surprizo kaj ekĝemis.

La dua kuglo eniris en lian kolon kaj tuj mortigis lin.

\*\* *Mauser* : (verŝajne Mauser C96) germana pistolo tre ofte uzita de la Rusaj Revoluciuloj.

Fino de la 3a ĉapitro.

## Kvara Ĉapitro

Unu monaton post la morto de Jurij, iu kuzo de la Karinoj duonmorta pro malsato kaj lacego, kiu iris de Odeso al Moskvo serĉante sian edzinon malaperintan

dum la aprila bombardo, haltis iun nokton ĉe Tatjana Ivanovna.



Li donis al ŝi novaĵojn pri Nikolaj Aleksandroviĉ kaj lia familio, kaj ilian adreson.

Ili bone fartis sed mizere vivis.

"Ĉu vi povus trovi fidindan homon..." li hezitis, "por alporti al ili, kion ili lasis ĉi tie?..."

La maljunulino foriris al Odeso, kunportante la juvelojn en la orlo de sia jupo.

Tri monatojn ŝi laŭiris la vojojn, kiel dum sia junaĝo kiam ŝi pilgrimis al Kievo, aŭ vojaĝis en trajnoj de malsatuloj, kiuj ekis suden iri.

Unu septembran vesperon, ŝi alvenis al la domo de la Karinoj.

Neniam ili forgesos tiun momenton, kiam ŝi frapis ĉe la pordo, kiam ili vidis ŝin aperi kun sia konfuzita kaj trankvila mieno, kun sia pako de vestaĉoj surdorse kaj la diamantoj batantaj ŝiajn lacajn krurojn, nek ŝian palan vizaĝon, kiam ŝi anoncis al ili la morton de Jurij...

Ili loĝis en malluma ĉambro, en la havena kvartalo. Terpomosakoj pendis sur la vitroj por mildigi la ekbatojn de la kugloj.

Helena Vasiljevna kuŝis sur terenĵetita malnova matraco. Lulu kaj Andreo ludis kartojn ĉe la lumo de eta stovo, kie tri karbopecoj finkonsumiĝis.

Jam malvarmis kaj la vento eniris tra la rompigitaj fenestroj.

Cirilo dormis en angulo, kaj tie Nikolaj Aleksandroviĉ komencis fari tion, kio poste fariĝos la ĉefa okupado de lia tuta vivo : paŝi de unu muro al alia kun la manoj krucitaj malantaŭ la dorso, songante pri kio neniam plu revenos.

"Kial ili mortigis lin?" demandis Lulu. "Kial, Sinjoro? Kial?"

La larmoj fluis sur ŝia ŝanĝiĝinta kaj maljuniĝinta vizaĝo.

"Ili timis, ke li revenos por repreni siajn bienojn. Sed ili diris, ke li ĉiam estis bona *barin*, kaj ke necesus eviti al li la malfeliĉon de ĵuĝado kaj ekzekuto; tial estus preferinde lin mortigi tiel..."

&gt;&gt;16

La valo nomita Glerárdalur [Valo de Glerá] kondukas de sude de la deklivo Kræklingahlíð [Monta deklivo de Kræklingar] al la montoj. El tiu valo venas la rivero Glerá, kiu enmariĝas ĉe la terlango Oddeyri [Pinta terlango] ekstere de Akureyri. La valo longdistance kondukas sudokcidenten inter la montoj. Fine ĝi dividiĝas en du valetojn, kaj la pli norda valetoj kondukas okcidenten kaj pli-malpli kondukas al la valo Bægisárdalur [Valo de Bægisá] okcidente. La alia valetoj ŝajnas konduki en sudokcidentan direkton, kaj tien kondukas glaĉerfajlitaj ŝtonŝtupegoj supren el la ĉefvalo. Oni ne konas la finon de tiu valetoj, ĉar malmultaj aŭ neniu sukcesis ĝin tute esplori pro malbona vetero kaj malbonodora nebulo, kiu ĉiam kontraŭvenas, kaj diris maljunaj homoj, ke kiam ili estis junaj kaj serĉkolektis ŝafojn en la valo, ke ili ofte sentis forte varman fumodoron el la valetoj. La bienoj de la plej proksima parto de Kræklingahlíð havas paŝt-rajton en la valo. La bieno Ytra-Krossanes havas tie paŝt-rajton ekde malnova tempo.

Iuaŭtune al farmisto Gamli en Krossanes mankis ses ŝafkastritoj en valo Glerárdalur. Oni serĉis ilin sensukcese. Tiel estis ankaŭ same post la ŝafserĉa kolektado. Gamli diris, ke oni ne sufiĉe bone traserĉis en la valo, kaj ke tie povus ankoraŭ esti netrovitaj ŝafoj. Li diris, ke li mem iros serĉi, kiam permesos la vetero. Mallonge poste Gamli ekiris sola kaj iris supren en la valon. La valo longdistance malmulte plialtiĝas for de la maro. Li esploris ĉiun lokon en la ĉefvalo dum la tago, kaj en la pli norda valetoj, sed nenion trovis. Poste li intencis esplori en la pli suda valetoj, por ke ne restu ia ajn dubo pri la ŝafoj. Sed

kiam li venis en la plej malsupran parton de la valetoj venis kontraŭ li fivetero kaj mirige malbonodora nebulo. Mallonge poste li vidas teruran monstrulon veni el la nebulo. Ĝi estis ina, grandega kaj krudaspekta. Ŝajnis al Gamli, ke ne estus konsilinde atendi ŝin, kaj li ankaŭ ne sciis, kiuj estaĵaĉoj povus ŝin sekvi. Li do ekkuris for kaj suben laŭ la valo. La monstrulino vokis eĥovoĉe kaj petis lin atendi, sed tio ŝajnis al li malavantaĝa kaj daŭrigis la fuĝon. Li kuris tiom rapide, kiom li povis, sed ŝi sekvis kaj proksimiĝis rapide. Li kuris tiom, kiom permesis liaj fortoj, kaj ĉie, kie eblis, li forĵetis siajn vestojn por malpezigi sin. Tie daŭris ĝis la mezo de la valo. Tiam Gamli vidis, ke tiom pliproksimiĝis la monstrulino, ke ŝi lin tuj ekkaptos. Tiam li decidis halti, kaj sin turnis al ŝi, manprenis siajn virajn organojn elpantalono kaj skuis ilin kontraŭ la monstrulino. Ŝi haltis kaj rigardis ilin dum kelka tempo. Poste ŝi skuis la kapon kaj diris: „Fi al tio, kio estas netaŭga, kaj laŭ mi estas mizera la virino, kiu havas vin.“ Poste ŝi kraĉis en lian direkton kaj foriraĉis. Gamli venis hejmen vespere, tre laca. Li opiniis sian vojaĝon ne tre sukcesa. Mallonge poste oni trovis liajn ŝafkastritojn pli supre en valo Bægisárdalur.

sendis **Steinþór Sigurðsson** el Islando

\*\*\* *Islanda popolrakonto skribita de Bólu-Hjálmar (1796-1875). La protagonisto, Gamliel Pétursson ("Gamli") naskiĝis en 1625. La rakonton tradukis Steinþór Sigurðsson. La tradukaĵo aperis en la 60-a numero de La Tradukisto (2009).*

## Pasantoj kaj Hundoj

## fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Amikoj du promenis en vesper'  
Kaj traktis ili grave pri afer'.  
Subite jen el subpordega loko  
Al ili Hund' ekbojis kun minac',  
Kaj poste du aŭ tri ripetis en aŭdac',  
Kaj baldaŭ preskaŭ cent' alkuris je provoko.  
Intencis jam Pasant' defendi sin per ŝton',  
Sed la alia tuj rimarkis kun rezon':  
"La bojo de Hundar' pro tio ja ne ĉesos,  
Pro via ŝtona frap' la Hundoj nur ekscesos.  
Ni iru simple for kaj ili ne agresos."  
Kaj fakte post nelonga voj',  
Plimalfortiĝis hunda boj'  
Kaj eksilentis ĝi per unu foj'.  
La enviuloj povas tre simili,  
Jen ili bojas kun impet',

Sed pasu vi trankvile, en kviet':  
Post bojo eksilentos ili.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)  
Ukrainio



**Kato kaj muso**  
**-aŭ-**  
**Ekzisto, Unu Komuna Afero**  
(filozofia, morala, eĉ metafizika, okazaĵo)

[ El membiografia romano de Marguerite Audoux (1863-1937) « La Marie-Claire-a Laborejo » (1910). ] :

« Iumatene S-ro Dalignac vidinte etan muson eliri el la porĉifona kesto, postulis apenaŭ ne koleriĝanta, ke Duretour iru tuj serĉi la katon de l'najbaro.

Tiu estis dika kato, naskiĝinta en la apuda apartamento, kaj kiu estis neniam vidinta muson. Li renkontiĝadis sur la interŝtuparo , kie li petadis por la karesoj de l'laboristinoj. Enirinte tuj ĝi sursaltis la stabmaŝinojn, kaj elesploris la laborejon flarekzamenante en ĉiaj anguloj, poste, ĉion vidinte, li ŝovis sian korpon en malplenan fakon por tie dormi komforte.

La eta muso antaŭsentis la danĝeron. Plurfoje ĝi montris sian subtilan muzelon inter la muro kaj la kamentabulo, sed ĝi ne aŭdacis iri pluen. Poste, ĉar la dika kato pludormadis, ĝi kuraĝiĝis kaj trakuris la laborejon kuirejen.

Ree ĝi agis la postajn tagojn. Ĝi pasis eteta kaj vigla kun sia beleta griza felo, kaj Bergounette , kiu ĝin gvatadis, ridis pro vidi ĝin tiom lertan.

Tamen ĝin ekvidis la kato ; tiu saltis peze de sia breto kaj iris malantaŭ ĝi en la kuirejon. Iom poste ĝi revenis, sed ŝanĝiĝintis ĝia sinteno. Ĝi paŝadis singarde, kaj ĝia tuta korpo plilongiĝadis ; ĝiaj okuloj fariĝintis eĉ pli flavaj, kaj siajn ungegojn ĝi malrapide ellongiĝadis. Ĝi denove ĉirkaŭiris la laborejon, sed, anstataŭ reveni al sia fako, ĝi lokis sin sub tabureto ĉe la kamenoniĉo. Ĝi aspektis dormanta, nazon sur la piedoj, sed unu aŭ alia el ĝiaj oreloj konstante streĉiĝantis, kaj vidiĝis inter ĝiaj palpebroj streko malhela.

Al la museto ŝajne ne urĝadis reveni, kaj neniu estis plu pensanta pri ĝi nek pri la kato, kiam ekaŭdiĝis krion tiom fajna kaj tiom longa, ke ĉiuj maŝinoj haltis, kaj ĉiuj ekrigardis tabureten. Ankoraŭ tie troviĝis la kato, sed kuŝe surflanke kaj, sub unu el ĝiaj kruroj, sterniĝanta, la vosto de l'muso elkuŝis kiel disa peco da nigra laĉo. Preskaŭ tuje swingiĝis la nigra laĉo, kaj forfuĝis la muso. Ĝi ne iris longe, la kato baris al ĝi la vojon, kaj turnis ĝin per krurbato. Ĝi unu temperon restis kiel morta, poste provis forkuri al la kuirejo ; denove la kato troviĝis

antaŭ ĝi.

Tiam ĝi freneziĝis el teroro ; ĝi deziregis elfuĝi ie ajn kaj iel ajn ; ĝi turniĝis aŭ impetis ĉiudirekten, kaj ĉiam ungegobate revenigis ĝin la kato en la laborejon. Estis momento kiam krediĝis ke, ĝi estis rezignacionta je morti , tiomtiome ĝi estis tremanta kaj sinka. Sed subite ĝi staris kontraŭ sia turmentisto. Ĝi tiom abrupte ekstaris ke ĝia impeto apenaŭ ne faligis ĝin malantaŭen : restis ĝi stare plentremetanta, moviganta siajn antaŭajn krurojn, dum ĝia sanganta buŝeto eligadis vice diversajn kriojn. Kaj ĉiu inter ni bone komprenis, ke ĝi estis superŝutanta je insultoj la egan monstron <sup>(1)</sup> , kiu rigardis al ĝi, kviet-side, klinante la kapon. Poste, Kvazaŭ ĝi estus mezurinta subite tutan sian malpovon, kaj kompreninta, ke nenio povis ĝin savi, ĝi ŝanceliĝis kaj refalis dum ĝi eligis akran ĝemon. Kaj tio estis tiom kompatinda, ke « Bouledogue » ekkaptis la katon je mezo de l'dorso, kaj ĝin ĵetis sur la tablon. Ĝi remalsupreniris tre rapide, sed la muso ne plu estis tie.

La mastro returnis al sia kuŝseĝo, kaj oni ne sciis ĉu kontente aŭ malkontente li diris :

- Nu ĝi estas for !

S-ino Dalignac spiregis, kaj ŝiaj du pugnoj, kiujn ŝi estis tenadanta premitaj ĉe l'brusto, subite malfermiĝis tiel, kiel ŝi mem nenion plu havis por timi. »

elfrancigis **Roland Platteau** el Francio  
26/10/2002

<sup>(1)</sup> tuta la simbolo de l'homa situacio.



## La legenda kreo de la lingvo Esperanto

La 11-a regulo de la Unua Libro estas la jena:

11. La kunmetitaj vortoj rezultas de simpla kunigo de la elementoj, kiuj formas ilin, skribitaj kune sed disigitaj per streketoj[\*]. La fundamenta vorto devige sidas fine. La gramatikaj finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj. Ekzemple : vapor'ŝip'o (bateau a vapeur) konsistas el vortoj: vapor – vapeur, ŝip – bateau, o – karakteriza finaĵo por substantivo.

[\*] *En leteroj aŭ verkoj por personoj, kiuj jam konas la lingvon, oni povas malmeti tiujn streketojn. Ili celas ebligi al ĉiuj facile trovi en la vortaro la precizan senco de ĉiu el la elementoj de la vorto, kaj sekve ricevi la kompletan signifon sen ia ajn antaŭa studo pri gramatiko.*

Tamen la dua parto de tiu regulo (la substrekitaj frazo) estas kutime neglektata, sed tamen ĝi estas unu el la plej gravaj reguloj por kompreni la veran strukturon de nia lingvo.

Bonvolu por kompreni nian lingvon pli bone, elŝuti la du dosierojn el la jena ligilo: [http://bonalingvo.net/index.php/%C4%88u\\_Esperanto\\_estas\\_fundamente\\_facila](http://bonalingvo.net/index.php/%C4%88u_Esperanto_estas_fundamente_facila)

**“Ĉu Esperanto fundamente estas facila?”**  
**“La perdita ŝlosilo”**

Ilin verkis **Pierre Telle Bouvier** el Francio kaj suben estas la fina kaj amuza parto de la unua dosiero:

### La legenda kreo de la lingvo Esperanto

El la Genezo, la unua libro ... de la Torao.


*Por ilustru la malatentitan frazon : < la finaĵoj estas rigardataj kiel vortoj >, lasu min rakonti, tute ŝerce , kiel kreiĝis Esperanto. Fakte ne Zamenhof sed ja Adamo kreis ĝin. Jen kiumaniere :*

**D**io montris al Adamo vicalvice ĉiujn siajn kreaĵojn por ke tiu nomu ilin. Sed Adamo diris ĉiufoje nur ho ! o ! o ! Do Dio klarigis: < jes ja: o signifas tio, kio estas, sed precizigu ĉiun malsimile. Antaŭmetu aliajn sonojn por distingi la vortojn, ekzemple: ter'o, mar'o... >

Adamo provis: < o o ... or'o >, li diris por la flava metalo. Poste : < F..flo...flor'o >. Bone diris Dio por lin kuraĝigi. Venis papilio sur la fingron de Adamo, kiu

## verkis Pierre Telle Bouvier el Francio

montris ĝin fiere kaj rediris “flor'o”, same kiel Bambi kelkajn jarmilojn poste. Ridante kaj babilante Dio korektas al papilio kaj indikas novan sonon bo kaj prezentas kreskaĵojn kaj helpas dirante: “her..”. “herb'o” krias Adamo. < Bone >, diras Dio, kaj li montras arbon : “a.. arb'o!” diras Adamo. Brave!



Kaj se paroli pri tio, ĉu vi scias kial la vorto arbo similas al barbo? Jen la klarigo : en tiu momento, Adamo sin turnante al Dio sur lia nubo, kaj vidante, sed kapalpede sur la vizaĝo de Dio, ion kiu similas al arbo, li montras tion kaj diras: < Bo, Ba, Barbo! > Tial similas la du vortoj.

Adamo nomas tiele ĉiujn objektojn, plantojn kaj bestojn, kiujn Dio prezentas duope, ĝis la fino. “fino ... ino”, tio donas al Dio ideon. Li endormigas Adamon kaj kreas inon. Li ŝin prezentas al Adamo, kiu nur sukcesas diri pro miro: “ha! a! a!” Denove Dio klarigas, ke li devas precizigi: a signifas kiu havas kvaliton aŭ rilata al, ekzemple: kia, bel'a, ina .... Adamo kreis: mi 'a, bon'a, et'a, afabl'a, eĉ dezir'ind'a, li eĉ iom konfuzis la kategoriojn nomante ŝin Eva...

Sed en la Edenĝardeno, Dio malpermesis al Adamo kaj Eva manĝi la frukton de la arbo pri kono de la bono kaj la malbono. Certe vi scias, ke temas pri malarbo (malus en la latina) sed Adamo jam nomis ĝin pomarbo, do Dio, kiu ne volis perdi sian latinon, proponis tamen mal al Adamo por formi la malajn vortojn: mal'bon'a, mal'bel'a, mal'permesit'a...

Pruve, post manĝo de la pomo ili eksciis, ke ili estas malvestitaj, nudaj, ĉar ili konsciis pri siaj seksoj, do Adamo proksimiĝis de Eva kiu kriis: hi, i, i... Tiufoje, anstataŭ Dio, estas Adamo kiu klarigas: “ ne diru nur: i = manifestiĝi, sed kompletigu, ekzemple : mi, tim'i, aŭ pli bone: mi tim'as, sed mi volas bonon por vi, ne tim'u! Mi dezir'as nur am'i vi'n!”

Do la kunulino ebligis al Adamo krei la ivortojn: am'i, dezir'i, kis'i, manĝ'i kaj poste la variaĵojn as, u, is... kaj fine la tre gravan n por povi distingi : mi am'as vi'n, ĉu vi mi'n am'as? \*, am'u mi'n!

Sed kiam



Adamo volis seksumi kun ŝi, sekve Eva kontribuis tiam al la kreado de vorto dirante: he! e! e = rilate al la tro rapida ago de Adamo, precizigante :“mal’rapid’e, pli mal’rapid’e far’ul!” ...

Tiele ili do kreis la adverbojn por nuanci la diraĵojn, kaj finfine estis kreitaj ĉiujn plej fundamentaj vortoj: o, a, e, i, u, as, is, os, us, j kaj n.

Tiu nepre vera rakonto montras tre bone ke, se la

radikoj estas gravaj por distingi la vortojn, la finaĵoj estas la plej gravaj kaj fundamentaj en la vortkonstruo de nia lingvo.

\* Sed kiam Eva metis tiun demandon al Adamo, tiu respondis: " Ĉu mi havas elekteblon? >

verkis **Pierre Telle Bouvier** el Francio

## La revuo **Brazila Esperantisto** centdekjariĝis

**L**a unua numero de nia revuo aperis kun la titolo “Brazila Revuo Esperantista”, en aprilo 1907, antaŭ do 111 jaroj. En 1908 oni ŝangis la nomon al “Brazila Esperantisto”, en 1938 al “O Esperantista Brasileiro” kaj en 1949 denove al “Brazila Esperantisto”.



Jam de aŭgusto 1907 (5a numero) ĝi estas la oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), fondita la 21an de la antaŭa monato, kadre de la 1a Brazila Kongreso de Esperanto.

En la numero de septembro 1908, la redaktoro anoncis la celon de la revuo, kiu

estas fervore batali ĝis la fina venko de nia bela lingvo internacia. Li aldonis: “Ĝi restas fidela al la Fundamento, malakceptante ĉiujn reformojn senregule faritajn kaj kiuj ne estos rezultato de natura evolucio de la lingvo, evolucio laŭ kiu Esperanto iom post iom pliboniĝos, kvankam konservante siajn unuajn regulojn, ĝis atingi la plej bonan kaj perfektan stilon.”

Interesa estas alia klarigo de la redaktoro, Reynaldo Fred Geyer, en la numero de septembro 1908: “La multekosta eldono de l’*Brazila Esperantisto* fariĝas la ĉefa malhelpaĵo de nia entrepreno, sed tio ne senkuraĝigas nin ĉar niaj samideanoj, kiuj bone komprenas la necesecon ekzisti revuo en Brazilujo ne lasos nin sole batalantajn.”

Brazila Esperantisto estas unu el la plej malnovaj Esperanto-revuoj en la mondo, veninta tuj post “*Sonorilo*”, “*Espero Katolika*”, “*Esperanto*”, “*La Brita Esperantisto*” kaj “*La Espero*”.

## verkis kaj sendis **Euripedes Alves Barbosa** el Brazilo

Sinjoro Reynaldo Fred Geyer estis la aŭtoro de la ideo fondi brazilan revuon. Li estis kunfondinto de la Sociedade Esperantista do Rio Grande do Sul kaj venis al Rio de Janeiro, en 1907, por fini en la Medicina Fakultato la kurson komencintan en la ŝtato Rio Grande do Sul. Geyer fariĝis membro de la Lingva Komitato en 1912.



La unuaj redaktoroj estis Alberto Álvares F. Vieira, Reinaldo Geyer kaj Everardo Backheuser, kiuj ne ŝparis tempon nek monon por eldoni la revuon.

Krom la tri menciitaj, estis ankaŭ redaktoroj de “*Brazila Esperantisto*” en la fruaj tempoj Alberto Couto Fernandes, Antônio Caetano Coutinho, João Batista Melo e Souza kaj Carlos Domingues.

Kiam Carlos Domingos mortis, en la jaro 1974, la respondeco pri la redaktado de BE venis al advokato Luiz Alberto Brandão Martins, kiu ricevis la kunlaboron de Joel Manso kaj Floriano Pessoa. Luiz Martins estis prezidanto de BEL dum la oficperiodo 1974/1977.

Aliaj samideanoj kontribuis por la redaktado de nia revuo, pri kiu ili sin dediĉis kun granda zorgo kaj intereso. Jen ili: Nelson Pereira de Souza, Itacir Luchtemberg, Gilbert Ledon, Symilde Ledon, Fabrício Rodrigues Valle, José Roberto Tenório, Carlos Maria,

Euripedes Alves Barbosa, Francisco Stefano kaj Evandro Ferreira de Avellar, ĉi tiu la nuna prezidanto de BEL.

Oni devas rekoni la intensan laboradon de tiuj redaktoroj, kies nomoj restas neforgeseblaj en la historio de



Brazila Esperanto-Ligo. Oni elutkore dankas ilin.

Nia BE interrompis sian aferon en la jaroj 1935/1937 pro diversaj kaŭzoj, laŭ informo de Carlos Domingues en letero de la 9a de februaro 1959, sendita al s-ro Otaviano Curvelo de Souza. La revuo ankaŭ ne aperis en la jaroj 1978, 1979, 1980, 1981, 1982. De 1984 ĝis 1988 denove la eldono de BE estis interrompita. La ĉefa kialo de la silento de BE estis la manko de monrimedoj. Estas multekosta la eldono de revuo en Brazilo. Aperigi nian revuon ne estas facila tasko por la estraro de Brazila Esperanto-Ligo, pro la manko de mono, kiel jam dirite, kaj pro la manko de kunlaborantoj.

La oficiala organo de BEL estas sendube efika

rimedo por la Esperanta propagando en Brazilo. Laŭ opinio de Gilbert Ledon, BE devas speguli nian brazilan kulturon kaj ne devas esti nur primovada. Laŭlonge de 111 jaroj, tiu revuo efektive disvastigas nian movadon, montras la laboradon de niaj samideanoj, elstarigas nian kulturon kaj literaturon, malgraŭ la nekontentuloj, kiuj kritikas, insultas kaj ofendas. Aliflanke la revuo ricevas laŭdojn. Por ekzemplo: Szabadi Tibor, el Hungario, en 2001, skribis "dankon pro la plej freŝa numero de la novforma BE. Ĝi enhavas belajn, bonkvalitajn fotojn kaj paperon. Oni ĝoje prenas ĝin en la manojn."

verkis kaj sendis **Euripedes Alves Barbosa** el Brazilo

## Elizo de la kamentubo

**F**raŭlino Elizo kreskis en familio de esperantistoj, kiu tre aktive kaj delonge propagandadis Esperanton.



Ŝia patrino estis verkinta multajn eseojn en la zamenhofa, ŝia patro estis prezidanto de la Fervojista Esperanta Asocio kaj ŝia avo estis tre konata ĉar li estis la unua

homo, kiu provis instrui Esperanton al simioj.

Neniu tiam antaŭvidus tion, kion Eliza estus konfesonta:

- "Panjo, paĉjo, aŭskultu min, mi devas diri ion tre gravan al vi" diris Elizo dum la matenmanĝo.

- "Jes mia kara, parolu!" samtempe diris la gepatroj.

- "Mi volus... mi ŝatus... ee..." balbutis la knabino.

- "Kuraĝon mia bonboneto, ne timu! parolu!" diris la patro amoplene.

## MIRI kaj ADMIRI

Inter la du vortoj **ADMIRI** kaj **MIRI** estas sufiĉe granda diferenco. Oni ofte malĝuste uzas ilin. Jen la diferenco:

**Admiri** = esti ravita, de la beleco aŭ supereco de io. Oni admiras la belaĵojn de la naturo, la majstrajn verkojn de la artoj, la heroajn homojn k.t.p.

**Miri** = senti surprizon, ĉar io estas neatendita, stranga, eksterordinara. Ekzemple: Mi miras pri tio, ke mia amiko ne respondis al mia grava letero. La popolo mute miris vidante la miraklojn.

**Konkludo:** ĉe la admiro la grava elemento estas la plaĉo, sed ĉe la miro la surprizo.

## verkis kaj sendis Maurizio Brucco el Italujo

- "Trankviliĝu mia kara, vi scias ke ni ĉiam helpos vin kaj ĉiam estos viaflanke por transpasi kune iun ajn problemon! ni amas vin pli ol nian vivon! vi estas nia vivo! kio okazis? ĉu vi estas graveda?"

- "Ne ne" tuj respondis Elizo ruĝiĝante.

- "Bone, do kio okazis?" daŭrigis la patrino.

- "Mi... mi... mi... mi volas kabei!"

La silento eksplodis en la ĉambro. La okuloj de la patrino pleniĝis je larmoj. Kaj jen la patro laŭte furiozis:

- "Senhonta! Stulteĝa! Idiotega! vi estas la ruino de nia familio! kial dio, kial? kial vi punis nin per tia tragedio? Kial?"

- "Terure!" ekkriis la patrino "mi neniam vidis tiom multe da kretenco koncentrita en unu sola homo! kia insulto! kia humiligo! sed tiu malrespektaĵo ricevos taŭgan punon! ekde nun vi vivu en la kamentubon de la salono!!! Tie porĉiame vi meditu pri la skandalo kiun vi alportis en ĉi tiun domon!"

Ekde tiam Elizo vivas tie. Kaj ekde tiam ŝiaj gepatroj sin vestas per nigraj funebraj vestaĵoj.

verkis kaj sendis **Maurizio Brucco** el Italujo de Internacia Esperanto-Instituto

Inter la du vortoj estas ankaŭ alia diferenco, tute ne malgrava. Oni ofte malatentas ĝin. Ĝi estas tio, ke "admiri" estas transitiva, sed "miri"

estas netransitiva verbo. Pro tio la ofte uzata vorto "mirinda" ne estas korekte formita, ĉar la sufikso "-ind-" estas uzebla nur kun transitivaj vebradikoj. Oni povas admiri ion, sed oni miras pro (aŭ pri) io. *La belega pentraĵo estas admirinda* (= ĝi meritas esti admirata), sed *la stranga konduto de iu homo estas miriga* (= vekanta, kaŭzanta miron).

“**Pri oftaj eraroj...**  
Esperanto-gramatiko

## Kiel mi ekaŭdis pri Esperanto?

verkis **Enrike el Argentino**

**J**am de infano, se iu demandus min, kio estas Esperanto? Mia respondo estus: Esperanto estas la internacia lingvo. (Bonvolu ne fari alian demandon pri Esperanto, tiu estis mia tuta scio pri Esperanto)

Kiam mi estis 21-jara, (jaro 1959) mia iomete pli aĝa frato diris al mi: Mi legas en la ĵurnalo, ke morgaŭ je la 6-a postagmeze estos prelego pri Esperanto en salono en la urbocentro. Ĉu ni iru?

Mi respondis: Jes.

La sekvanta tago ni devis fari malsamajn agojn dum la tago. Ni konsentis ke ni renkontiĝos ĉe la salono... Mi iris... Li neniam aperis.

La preleganto nomiĝis Enrique Kohei (1921-1997).

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Enrique\\_Kohei](https://eo.wikipedia.org/wiki/Enrique_Kohei)

Li parolis dum 45 minutoj pri Esperanto kaj dum 30 minutoj en Esperanto. Kaj ni ĉiuj komprenis ...

Mi multe ŝatis tiun prelegon. Pro tio mi faris nenion...

Post kelkaj semajnoj mi vizitis la lokan publikan bibliotekon pro alia neceso. Post kiam mi jam forlasis la konstruaĵon kun kelkaj libroj en miaj manoj, mi memoris pri Esperanto. Mi revenis en la konstruaĵon, kaj luprenis simplan libron por lerni Esperanton (ankoraŭ uzata en multaj landoj kiuj parolas hispane).

Mi revenis hejmen, lasis la libron sur breton... kaj forgesis pri ĝi ...

Kelkaj tagoj poste, mi bonŝancis! Mi malsaniĝis, kaj

devis resti dum du tagoj en la lito. Dum tiuj du tagoj mi legis la tutan libron. Mi kalkulas, ke mi legis dum ĉirkaŭ 20 horoj.

Tio sufiĉis por ke mi pensu, ke mi jam sciis Esperanton. Mi kredas, ke ĉi tio okazis en aŭgusto 1959. Du monatoj poste, dum la semajnofino de Kristoforo Kolombo (la 12-an de oktobro), mi estis vere, vere bonŝanca: Okazis Nacia Kongreso je 20-minuta piedirado ekde mia domo. Estis iomete pli ol 200 partoprenantoj.

Dum la unua tago mi ne bone komprenis. La duan tagon mi trovis spertulinon samaĝan kiel mi, kaj ni parolis la tutan tagon en Esperanto. Ŝi estis tre pacienca kun mi. Mi parolis tre malrapide, pensante pri ĉiu vorto, sed mi parolis.

Ekde tiam mi ĉiam uzis Esperanton, precipe per legado de libroj aŭ revuoj, kaj korespondado kun homoj de aliaj landoj... per ŝipa poŝto... mi ne povis pagi por aerpoŝto. Iam mi ricevis respondon de letero el Ĉinio... post ses monatoj ! (Argentino estas la plej fora lando el Ĉinio... )

Nun, mi celas partopreni en BET-55 en Panevėžys, Litovio, kaj en la UK en Lahtio, Finnlando ... por daŭre uzi Esperanton.



verkis **Enrique Ellemberg** el Argentino

## Kiel mi starigis oficialajn Esperanto-kursojn en mia universitato en Venezuelo

verkis **prof-ro Jesuo R. Cedeño el Venezuelo**

**M**i ne bone memoras kiam okazis mia unua renkontiĝo kun la internacia lingvo, sed bone memoras kiel tio efektiviĝis. Iam dum la mezaj 90-aj jaroj mi legis artikoleon en popolsciencia revuo pri facile lernebla lingvo kiu celis esti solvo por pli bona internacia komunikado. La artikoleto eĉ havis kelkajn regulojn de la lingvo (mi memoras la j-finaĵon por pluraloj). Tiu lingvo ŝajnis al mi interesa, sed tiam mi havis nenian rimedon por trovi plian informon pri la lingvo, kaj do mia scivolemo devis resti malsata, sed unu vorto bone instaliĝis en mian cerbon: esperanto.

Dum la jaro 2000, mi havis mian unuan hejman aliron al interreto. Malmulte de tempo pasis antaŭ ol la nomo de tiu interesa lingvo pri kiu mi iam legis, revenis al mia menso, kaj mi decidis tuj serĉi informon. Mi trovis paĝon kiu enhavis priskribon de la esperanta gramatiko, sed ne estis vera kurso de esperanto. Mi tralegis tiun gramatikon, kaj mia intereso pligrandiĝis. Kelkaj tagoj poste, serĉo per Yahoo! (Guglo ankoraŭ ne ekzistis tiam) direktis min al la Senpaga Retpoŝta Esperanto-Kurso de ELNA, kaj

per tiu kurso mi esperantiĝis, sub la gvido de Oleg Izjumenko. Tiam mi studis mian lastan jaron en la medicina lernejo, kaj kompreneble havis noktajn deĵorojn. Mi ĉefe studis dum tiuj noktoj, legante lecionojn kaj solvante ekzercojn inter pacientoj. Post la deĵoro, antaŭ enlitiĝi, mi sendis miajn ekzercojn al Oleg. Mi finis la kurson komence de 2001, kelkajn monatojn post mia kuracistiĝo.

Do, mi fariĝis esperantisto! Tre bone! Sed restis unu problemo... Mi estis la sola esperantisto en la urbo. Ĉu vere utilas scipovi lingvon se estas neniu alia interparolanto? Mi komencis labori kiel instruisto en la universitato en majo 2001, kaj mi opiniis ke bonega maniero praktiki mian ĵus-lernitan lingvon estus instrui ĝin al aliuloj. Sed mi volis fari tion oficiale. Necesis starigi oficialajn, elekteblajn esperanto-kursojn en mia universitato. Tamen, estis tri obstakloj al tio:

- 1) Universitataj reguloj kaj procezoj.
- 2) Manko de scio pri esperanto, kaj



3) Mi mem.

Universitataj procezoj: starigo de elektebla kurso en la universitato estas longa, teda kaj ĝenerale malfacila afero. Sekve, malmultegaj instruistoj eĉ klopodas ĝin. Tial, estas malmulte da elekteblaj kursoj por niaj studentoj. Por kuracistiĝi, studento bezonas gajni kvar elekteblajn kredunuojn dum sia lernado. Kiam mi eklaboris en la universitato, estis nur dek malsamaj elekteblaj kursoj por medicinstudentoj, kiuj kapablis ricevi po ĉirkaŭ 200 studentoj semestre. La fakultato havis tiam proksimume 1600 studentojn. Do, estis grava manko de elekteblaj kursoj, kaj tiu manko pligrandiĝis ĉar la nombro de studentoj rapide plialtiĝis. Tuj post havi fiksitajn postenojn en la universitato, mi enkondukis la proponon por starigo de du elekteblaj esperanto-kursoj. Tio okazis en la jaro 2004. Ĝuste tiam, la universitataj estroj komencis ricevi multajn premiojn kaj plendojn pro la manko de elekteblaj kursoj. Ĉiam kiam mi aŭdis studenton plendi pri tio, mi informis "Jes, tiu manko estas terura! Sed ĉu vi scias ke estas projekto por du novaj kursoj, kiu restas en la burokrata procezo?". Ju pli da studentoj sciis pri la projekto, des pli da premo al la aŭtoritatuloj.

Manko de scio: Eble tio ĉi ne estas tiom granda afero ĉe vi, sed ĉi tie oni nenion sciis pri esperanto. La plejmulto el homoj eĉ ne konas la vorton. La malmultegaj uloj kiuj ja konas ĝin havas tre diversajn ideojn kaj opiniojn. Interalie: "Esperanto estas malnova, mortinta lingvo"; "Ĝi estas idealisma projekto"; "Ĉu tio ne temas pri iu religio?", kaj mia plej ŝatata opinio: "Esperanto estas la lingvo kiun parolis Adamo kaj Eva en Edeno, ĉu ne?". Do, necesis enkonduki esperanton al la studentaro, sen la ebleco paroli la lingvon al alia persono. Dum multe da tempo, en mia oficejo ĉiam ludis esperantan muzikon, kaj sur mia skribotablo ĉiam "hazarde" troviĝis ia materialo pri esperanto. Ĉu revuo, ĉu artikolo, ĉu ĵurnalo. Do, kiam studento neeviteble eniris mian oficejon por klarigon pri bioĥemio, ties okuloj ĉiam trovis ion en tiu nekonata lingvo. Pro scivolemo, ili preskaŭ ĉiam demandis "Kiu lingvo estas tiu?", malfermante la tiom bezonatan pordon. Kompreneble, temis pri formika laborado. Sed iom post iom, jaron post jaro, pli kaj pli da studentoj sciis pri esperanto kaj kiel ĝi povus esti bona alternativo por elektebla kurso en la universitato. Kaj tio ankaŭ helpis fari premon al la aŭtoritatuloj.

Intertempe, la burokrata procezo daŭriĝis. Kaj dum julio 2009, kvin jaroj post enkonduko de la projekto, mi ricevis alvokon de la studplana komitato: mi havis la permeson starigi la kursojn! Sed ankoraŭ restis unu obstaklo: mi mem.

Kial mi mem estis obstaklo? Mi konfesas ke mi ne

estas facila instruisto. Mi estas ja postulema instruisto, instruante malfacilan kurson. Kiam la studentoj eksciis pri la projekto por la kursoj, oni ofte aŭdis la demandon "Bioĥemio estas deviga kurso, kaj do kelkaj studentoj devige sekvas kurson de D-ro Cedeño. Sed kiu freneza menso volonte aliĝos al kurso lia?". Laŭ multaj studentoj, mi estas ne nur postulema instruisto, sed ankaŭ malbona persono, fiulo, kaj eble murdisto aŭ eĉ kanibalo. Sed tion pensas ĉefe studentoj kiuj studas bioĥemion sub ALIAJ instruistoj. Miaj propraj studentoj konas la veron: mi estas ĝenerale afabla kaj bonkora, sed ja postulema. Al miaj studentoj kiuj interesiĝis pri esperanto, mi klarigadis ke mia postulemo kaj la malfacileco de la kurso estas ĉar bioĥemio estas malfacila scienco. Sed esperanto estas lingvo kiu, pro dizajno, estas facila. Do, la kurso estos facila. Sufiĉe da lernantoj fidis je mi, kaj en oktobro 2009 mi ricevis miajn unuajn esperanto-lernantojn.

Tiel mi starigis tiujn kursojn kiuj ankoraŭ elekteblas en la Sanscienca Fakultato. Mi instruas kurson kaj bazan kaj progresigan. La venontan semajnon nova semestro komenciĝos en la universitato, kaj 40 studentoj aliĝis la bazan nivelon, kaj 10 la progresigan.

verkis prof-ro **Jesuo R. Cedeño** el Venezuelo

Fonto: <https://telegra.ph/Kiel-Mi-Starigis-Oficialajn-Esperanto-Kursojn-en-Mia-Universitato-en-Venezuelo-01-14>





## Facillingva retejo de UEA

La 19an de januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas [uea.facila](http://uea.facila.org), kaj ĝi estas videbla ĉe: <http://uea.facila.org>. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperanto-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo "Niaj legantoj", kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de Kontakto, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: <https://uea.facila.org/vortlisto/>

La ĉefredaktoro estas Anna Löwenstein, kaj jam formiĝis tuta reto de kunlaborantoj. Emilio Cid, estrarano de UEA, subtenis la projekton ekde la komenco, kaj estas grave mencii la kontribuon ankaŭ de ESF, kies subvencio necesas por ricevi la helpon de profesia programisto.

informas **Emilio Cid** estrarano de UEA  
Informado, Amikoj de Esperanto, Forumo

## Facillingva retejo

UEA kreis kaj mastrumas facillingvan paĝaron por komencintoj. Vi trovas tie facilajn tekstojn, artikolojn, filmojn, ktp. kun klarigoj kaj helpoj. Ni konsilas al la instruistoj kaj kursgvidantoj trastudi la retejon kaj konsili ĝian uzon al siaj kursanoj.

La celo de la retejo estos informi novajn esperantistojn pri agadoj en la Esperanta mondo, kaj precipe pri UEA. Miloj aŭ eĉ milionoj da homoj nun lernas Esperanton per Duolingo, sed ili scias tre malmulte pri la movado kaj ili ne membriĝas en UEA. Tio havas la sekvon, ke dum la nombro de esperantistoj kreskas, UEA perdas membrojn kaj estas nun en financa krizo.

La retejo enhavas mallongajn artikolojn taŭgajn por lernantoj, verkitajn laŭ la ĵus reviziita vortlisto de la revuo Kontakto.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti.

Artikoloj en la retejo aperos sub la kategorioj:

Movado, Homoj, Kongresoj kaj kunvenoj, Opinioj, Legaĵoj, Libroservo, Lingvo, Tra la reto, Kalendaro.

Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, kaj ankaŭ prezenti sin en la paĝo "Niaj legantoj".

Nia redakcio deziras sukceson al la nova retejo, interesajn artikolojn, diligentajn kunlaborantojn kaj interesiĝantajn legantojn. <https://uea.facila.org/>  
Fonto: edukado.net

<https://edukado.net/novajhoj?id=780>

## Ankaŭ Zamenhof estis komencanto

La vivo de komencanto estas la plej bela periodo en la vivo de esperantisto. Oni malkovras, ke Esperanto, kiam oni parolas ĝin, estas pli komprenebla ol oni imagis, oni malkovras la aliajn esperantistojn, kiuj ĝenerale estas interesaj homoj, oni malkovras ke la verkoj de bonaj verkistoj estas legeblaj sen vortaro. Ĝuste por la komencantoj aperis NOVA RETEJO DE UEA EN SIMPLA ESPERANTO. Ĝia nomo estas [uea.facila](http://uea.facila.org), kaj ĝi estas videbla ĉe: <https://uea.facila.org>. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti. La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperanto-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj

-- de Renato Corsetti, el Italujo

materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj.

El Popola Ĉinio ĵus konsilis ĉinajn komencantojn legi ĉi tiun artikolon: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/%C4%89u-la-unua-scienc-fikcia-libro/>

Legu ĝin ankaŭ vi, kaj se vi volas esti daŭre informata pri novaj artikoloj aliĝu en Facebook al la grupo [uea.facila](http://uea.facila)

**Renato Corsetti**  
Kunordiganto de MONA



## La bela kaj perfekta Esperanto

**A**nkaŭ pluraj etnaj lingvoj kapablas fari adjektivojn el kombinaĵoj de substantivo kun sia adjektivo (largeheaded, singlehanded), sed multe malpli ol Esperanto. Observu la jenajn:

La nova aŭtomobilo de la nova reĝo. Do la "reĝa aŭtomobilo", kion oni ne rajtas kombini ĉar estas substantivo kun sia adjektivo, kio ne eblas. Do NE La reĝaŭtomobilo.

Sed eblas kombini substantivon kun sia adjektivo, se la rezulto estas adjektivo, do: La novreĝa (aŭtomobilo). Eĉ: La nova novreĝa aŭtomobilo. Sed ne eblas kombini nova kun aŭtomobilo, ĉar ili rezultus en substantivo; do NE La novaŭtomobilo. Sed eblas: La novaŭtomobila stirado. Ekzistas naturaj tialoj por tiuj reguloj.

Jen alia ekzemplo: La juna filo de la juna patro. NE eblas: la junfilo, nek la junpatro. Sed eblas: La junpatra juna filo. Aŭ La juna junpatra filo. Kompreneble ankaŭ: La junfila (juna) patro.

La nokto kun plena luno: La plenluna nokto. (Komparu: La lunplena nokto = kun multe da lunlumo).

## verkis Marcel Leereveld el Aŭstralio

La regulo do estas: Oni neniam povas kunglui substantivon kun sia adjektivo, do NE Junpatro nek Junfilo, sed jese se oni kombinas ilin ĝis adjektivo (junfila, junpatra), aŭ ĝis adverbo.

Simila regulo aplikiĝas ĉe verbo kun sia adverbo: NENIAM rapidmanĝi (el: rapide manĝi) NEK klarlegi (el legi klare), sed eblas: rapidmanĝe kaj rapidmanĝado, kaj klarlega kaj klarleganto.

Nek eblas kombini verbon kun sia gramatika objekto: NENIAM Ŝi kukbakis (el Ŝi bakis kukojn), NEK Oni ne rajtas alkoholtrinki ĉi tie (el: trinki alkoholon). Sed eblas kukbakado kaj kukbakisto kaj alkoholtrinka (junulo) kaj alkoholtrinkantoj.

La tialoj por la reguloj estas naturaj, interesaj nur por lingvistoj.

verkis **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio


Fonto: **AŭstraliaEsperantisto** AE #400



## La Sperto de Meditado

-- el blogo **Pri lo Ajn**

**P**or plibonigi la sanon de mia menso kaj ĝin trankviligi, mi celas mediti ĉiutage. Eble mi faras tro multajn ĉiutagajn celojn sed tiu celo estas malsama ol la aliaj. Meditado ne donas al mi pli da streso sed evitas ĝin. Mi skribis pri la profitoj de meditado pli frue ĉi-monate. Tamen mi ne skribis pri mia sperto dum meditado.



Nun mi priskribas tion.

Mi faras ĉefe plenatentan meditado. La celo estas atentigi sin mem al la sperto de estado. Oni rimarkas ian senson aŭ penson. Oni ne juĝas tion. Oni ne amas aŭ malamas kion oni rimarkas. Oni simple rimarkas ĝin. Ofte oni fermas la okulojn kaj spiras regule kaj profunde, sed iam oni ne fermas la okulojn aŭ gvidas la spiradon sed anstataŭ rimarkas tiujn spertojn. Dum la meditado, oni spertas estadon.

Eble vi pensus, ke la celo estus forigi stresigajn pensojn, kiam ili estas rimarkitaj sed tio ne estas la

okazo. Malbonaj pensoj iam eniras la menson. Denove, oni rimarkas tion kaj ne juĝas.


Tio eble ŝajnas stranga. Ĉu la celo de meditado ne estas senstresigi sin? Jes ja, sed juĝi tiajn pensojn ne helpas. La pensoj mem ne estas la problemo, ĉu ne? La rezulto, la reago, estas la problemo. Oni devas ne reagi tiel. Nur rimarki ĝin, ne juĝi, ne provi ŝanĝi.

Kio se emocioj estas la fonto de problemoj? Kio se kolero aŭ malĝojo atakas la menson? Denove, oni rimarkas tion. Oni ne atakas sin pro siaj emocioj. Oni ne juĝas sin pro senti tion. La emocioj estas realaj spertoj kiel senti la seĝon sub si aŭ aŭdi ian sonon en la ĉambro. Ili ne estas pravaj aŭ malpravaj. Ili simple estas.

La ideo estas simpla sed la rezulto estas profunda.

Tiu praktiko venas de budhismo sed mi rimarkas kelkajn similaĵojn al stoikismo. Marko Aŭrelio diris "Forprenu vian opinion kaj estos forprenita la plendo. Forprenu la plendon kaj la doloro estos forprenita." Ideo de tia meditado estas forpreni plendojn per forpreno de opinioj. Tiel oni forprenas la doloron.

Seneko la Juna diris "Ni suferas pli ofte en imagoj ol en realo." Ofte ni atakas nin pli ofte ol esti helpemaj. Per meditado, ni povas trovi la streson malpli malbona. Ni ne forgesas ĝin, sed ni ne plu imagas ke



ĝi estas pli malbona ol en realo. Per rimarkado de la realo, anstataŭ esti kaptita per pensoj kaj imagoj, ni suferas malpli.

Se vi suferas pro streso, kaj vi neniam provis meditado, mi sugestas ke vi provu ĝin. Kie ajn vi estas, haltu kaj rimarku la estadon. Vi povas fermi la okulojn, aŭ ne. Vi rajtas gvidi la spiradon, aŭ ne. Rimarku viajn spertojn. Kion vi sentas? Kion vi penas?

Ne juĝu. Ne ŝanĝu ilin. Nur rimarku.

Simple spertu estadon dum kelkaj minutoj. Ne pli, ne malpli.

verkis **Jason Mey** el Usono

Fonto: <https://prioajn.wordpress.com/2019/01/19/la-sperto-de-meditado/>

## Kurantaj Birdoj

-- el blogo Scivolemo

Inter la plej popularaj grupoj de bestoj estas la birdoj. Sendube entuziasmoj estas kaptataj de la buntaj plumaroj kaj rekoneblaj krioj. La kaŭzo de tiu granda diverseco kaj kvanto de birdoj estas ilia evolua sukceso, kiu estas la rezulto de adaptiĝoj kiel la flugkapablo kaj la aktiva vivstilo. Estas do strange imagi ke birdoj perdus sian flugkapablon, sed ekzakte tio okazis plurfoje en malsamaj grupoj de birdoj. Unu el tiuj grupoj, la palaeognathae, havas membrojn en Oceanio, Afriko kaj Sudameriko kaj fosilioj estis trovitaj ankaŭ en Nordameriko, Azio kaj Eŭropo. Multaj el ili estas altaj, pezaj birdoj, kiuj kuras anstataŭ flugi kaj klare aspektas kiel dinosaŭroj.

### AFRIKO

#### Strutoj

En Afriko ekzistis du malsamaj grupoj, nome la strutoj, kiuj daŭre vivas en diversaj partoj de kontinenta Afriko, kaj la formortintaj elefantbirdoj, kiuj vivis sur Madagaskaro. Strutoj estas tre konata parto de la Afrika faŭno kaj mirigas vizitantojn per sia grandeco. Plenkreskaj strutoj povas pezi 63-145kg. La maskloj iĝas 2,1-2,8m altaj kaj femaloj 1,7-2,0m altaj, kio igas strutojn la plej grandaj vivantaj birdoj. Ankaŭ la ovoj de la struto havas rekordon. Kun pezo de 1,4kg ili estas la plej grandaj ovoj de vivanta birdo kaj ili estas 15cm laŭ la longa flanko. Kompare al la korpo de la patrino tamen, ili estas etaj.




Struto

La korpo de la struto neniel taŭgas por flugado. Ĝi ankaŭ ne aspektas tre aerodinamika. Ĝi estas tre

peza kaj ĝiaj flugiloj estas tro malgrandaj por porti tiom da maso. Aldone, la karino, al kiu la flugmuskoloj estas konektitaj en aliaj birdoj, ne ekzistas en strutoj kaj aliaj palaeognathae. Anstataŭe, ili havas platan sternumon. Laste, la plumoj ne estas taŭgaj por flugado. Kiam oni detale rigardas la plumojn de flugantaj birdoj, oni vidas ke la haretoj havas fiksan strukturon. Tio estas pro multaj etaj hokoj, kiuj konektas la haretojn. En strutoj, tiuj hoketoj tute mankas, kio igas la plumojn tre ĥaosaj.



Malgraŭ tio, ke ĝi flugas, la struto ne estas senhelpa. Flugado kostas multe da energio kaj certe estas evitinda, kiam oni ne bezonas ĝin. Anstataŭe, la korpo de la struto estas tute adaptita por vivi en la varma, ebena medio en kiu ĝi vivas. Ĝia plumaro estas tre bona izolaĵo por konservi varmon kaj per kovri siajn nudajn kruojn, ĝi povas mem reguli kiom da varmo ĝi volas perdi



Fluganta birdo kiel karino estas indikata per blua koloro

aŭ konservi. Tio estas tre grava, ĉar strutoj vivas en lokoj, kie la temperaturdiferencoj inter tago kaj nokto povas atingi 40°C. Aldone, strutoj ne bezonas timi predantojn. Se ili estas minacataj, ili povas kaŝi sin per sidiĝi sur la grundo, ili povas rapide forkuri aŭ ili povas eĉ ataki per siaj fortaj kruoj. La struto fakte estas mirinde bona je kurado. Ĝi povas kuri je 50km/h dum duonhoru kaj se ĝi vere kuras, ĝi povas atingi rapidojn de 70km/h averaĝe kaj eĉ 96km/h dum momento. Tio igas ĝin la plej rapida besto sur du kruoj. La flugiloj povas esti uzataj por rapide bremsi, aŭ por fari akrajn turnojn kaj ankaŭ la piedoj estas adaptitaj al kurado, ĉar malkiel aliaj birdoj, strutoj havas nur du piedfingrojn.


## Elefantbirdoj

Elefantbirdoj vivis en la tuto de Madagaskaro, sed iam dum la mezepoko ili formortis. Estas sufiĉe klare ke la ĉeesto de homoj kaj hejmbestoj ludis gravan rolon en tiu formorto. Tio eble parte okazis pro ĉasado, sed multe pli grava estis la manĝado de la ovojn.



*Kuranta struto*

Elefantbirdoj produktis gigantajn ovojn de 10kg kaj povis iĝi laŭ volumeno 160 fojojn tiom granda kiel la ovo de kokino. Tiom granda ovo povis nutri multajn homojn. Bedaŭrinde, elefantbirdoj kaj aliaj palaeognathae estas K-strategiistoj. Tio signifas ke ili ne havas cent etajn, malmultkostajn ovojn, el kiuj multaj ne travivos, sed anstataŭe havas nur kelkajn grandajn ovojn, kiuj havas grandan ŝancon de travivi. Tiu strategio povas esti tre bona, pro tio ke la grandaj ovojn signifas ke la idoj naskiĝas tre memstaraj kaj plenkreskaj. Kiam homoj ekmanĝis la ovojn tamen, la elefantbirdo ne povis produkti sufiĉe da ovojn por travivi kiel specio. Tio, kune kun aliaj faktoroj, kaŭzis ne nur la malaperon de la elefantbirdoj, sed ankaŭ tiun de aliaj neflugaj birdoj kiel la dinornito kaj la dido, kvankam la dido ne estas membro de la palaeognathae.



*Skeletono de elefantbirdo*

Oni pensas ke elefantbirdoj estis la plej grandaj birdoj en historio. Ili iĝis 3m altaj kaj atingis imponan pezon de 730kg. Ili verŝajne aspektis multe kiel strutoj el Afriko, sed multe pli grandaj kaj kun pli dikaj kruroj. Genetikaj analizoj montras tamen ke ĝi pli proksimas al la Novzelandia kivio, kiu tiom grandas kiel kokino. Estas interesa fakto ke la nomo elefantbirdo eble ne venas

de la grandeco de la birdo, sed de araba legendo de la brido Roĥo, kiu estis tiom giganta ke ĝi povis kapti elefantojn.

## SUDAMERIKO

Nur unu grupo de palaeognathae vivas en

Sudameriko. Temas pri la reaoj, aŭ nanduoj. Ili estas pli etaj ol strutoj sed por birdoj sufiĉe imponaj.

Kvankam ili aspektas kiel strutoj, ili ne estas la samaj kaj tio videblas interalie kiam temas pri reproduktado. Virreaoj kolektas 2-12 femalojn kaj zorgas ke ili restas kune ĝis ili pretas por la reproduktado. Kiam alia virreao venas, ĝi povas minaci kaj imponi la masklon ĝis unu el la du estas fortimigata. En ĉi tiu video (ligilo) videblas maloftaj bildoj de du maskloj, kiuj batalas por la femaloj. La virreao montras sian intereson per kurado kaj montrado de la flugiloj kaj finfine dancas per la kolo. Kiam la reanoj pretas por la reproduktado, ĝi reagis pozitive kaj ili faras la agon. Poste, la ovojn de la femaloj estas kolektitaj en unu nesto kaj la masklo, ne la femalo, kovas ilin. Tion ĝi faras sole dum pli ol kvin semajnoj, dum kiuj ĝi estas ege protektema. La kostoj de la kovado estas tiom grandaj tamen, ke multaj maskloj ne eltenas kaj devas foriri por manĝi, kio rezultas je la morto de la ovojn. La femaloj intertempe jam trovis novan masklon. Tiel, ili pligrandigas la ŝancon ke almenaŭ unu el la maskloj sukcesos kovi la ovojn ĝis la fino. Strutoj estas multe pli kunlaboremaj kaj la maskloj kaj femaloj kovadas kune, unu post la alia. Ili ankaŭ akceptas ovojn de aliaj strutoj, kvankam ili ĉiam metas la proprajn ovojn en la mezo.



*Reaoj, fotitaj de Nino Barbieri*

## AŬSTRALIO

### Kazuaro

La plej ekstertera membro de la palaeognathae estas la kazuaroj kun iliaj bluaj koloj kaj strangaj ruĝaj pendaĵoj. Malkiel la kurantaj struto aŭ reao, aŭ eĉ sia samlandano, la emuo, kazuaroj ne loĝas sur grandaj, plataj terenoj, sed en densaj arbaroj. La tri specioj estas identigeblaj per la bridoj, kiuj pendas de la gorĝo. La plej granda specio havas du bridojn kaj iĝas 190cm alta. Ĝi vivas en Novgvineo kaj la nordorienta parto de Aŭstralio. La alia specio, kiu estas iomete malpli granda, havas nur unu brido kaj loĝas en la nordo de Novgvineo. La plej eta specio iĝas 150cm kaj vivas en Novgvineo. Kazuaroj havas fortegajn

krurojn kaj ĉiu piedo havas tri piedfingrojn, el kiu unu havas gigantan ungon de maksimume 12cm. Tiuj ungoj estas uzataj por sindefendo, sed ankaŭ povas esti uzataj por levi fruktojn de la grundo. Se necesas, ili povas uzi ilin ankaŭ por kurado ĝis 50km/h kaj saltado. Pro tio ke ili ŝatas kelkajn fruktojn kun grandaj semoj, ili helpas la plantojn kun la disvastigado de tiuj semoj. Tio igas ilin grava parto de la ekosistemo.

Kazuaroj povas esti tre minacaj. La femaloj eĉ atakas siajn proprajn idojn se ili renkontiĝas. Malgraŭ tio, la birdo ne estas tiom danĝera kiel oni ŝajnis interrete. Se oni agas respektplene, ĝi faros nenion, sed se oni minacas ĝin, ĝi povas ataki. Entute nur unu homo estis mortigita de kazuaro kaj tio estis el memdefendo.



*Kazuaro*

### Emuoj

Emuoj estas genitike plej proksimaj al kazuaroj kaj loĝas en Aŭstralio. Malkiel kazuaroj, ili ne vivas en la arbaro, sed ofte sur plataj kaj sekaj terenoj. Tio igas ilian vivstilon pli simila al tiuj de strutoj kaj reaoj. Interesa diferenco estas la fakto ke la femaloj iniciatas la reproduktadon. Ili provas interesigi la masklojn per kurado kaj montrado de la plumoj kaj eĉ agrese batalas kontraŭ aliaj femaloj. Se la masklo interesiĝas, ĝi streĉas la kolon kaj plumojn kaj pikas la grundon per la beko. Poste ĝi ĉirkaŭiras ĉirkaŭ la femalo kaj frotas kontraŭ la femalo per la brusto. Tiam la femalo decidas ĉu ĝi ankoraŭ estas interesita kaj daŭrigas kun la reproduktado, aŭ forpelas la masklon per agreso. Kelkaj femaloj atendas dum la kovado kaj helpas la masklon, dum aliaj iras serĉi aliajn masklojn intertempe. Kiam la idoj eliras el la ovo, la masklo iĝas tre protektema kaj eĉ forĉasas la patrinon se ili renkontiĝas.



*Emuo*

<https://www.flickr.com/photos/aenneken/135827299/>

### NOVZELANDO

Novzelando estas tiom izolita, ke antaŭ la alveno de homoj, preskaŭ neniuj mamuloj ekzistis sur la insulo. Nur kelkaj vespertoj kaj marmamuloj kiel delfenoj kaj fokoj povis atingi ĝin. Tio signifis ke birdoj ne bezonis konkursi kontraŭ mamuloj kiel en aliaj partoj de la mondo kaj ke ili provis preni iliajn lokojn. La rolo de granda herbovorulo estis prenita de la formortinta dinornito kaj tiu de talpo estis prenita de la kivio.

### Dinornitoj

Kiel elefantbirdoj, dinornitoj formortis pro la alveno de homoj sur ilia insulo. Pro la granda fosiliaro kaj la kvanto de konservita DNA, neniu granda prabesto estis tiom profunde pristudata kiel la dinornito. Oni scias pro la analizado de la antikva DNA ke la populacioj estis genetike diversaj kaj stabilaj antaŭ la alveno de homoj, sed post tio, ili formortis tre rapide. Oni estimas ke ili eble nur eltenas jarcenton kun homoj. Verŝajne la problemo estis la manĝado de ovoj, ĉar kiel la elefantbirdo, la dinornito havis malmultajn ovojn. Ne estas kvazaŭ ili estis tute sekuraj antaŭ la alveno de homoj, tamen. Ili havis unu malamikon, kiu nomiĝas la aglo de Haast. La aglo de Haast estis la plej granda aglo surmonde kaj verŝajne iĝis tiom granda kiel respondo al la grandeco de la dinornito. Post la formorto de la dinornito, ankaŭ la aglo de Haast rapide formortis. Malgraŭ la paralelojn inter la dinornito kaj la elefantbirdo, ili ne estas tiom proksimaj. Fakte, la plej proksima parenco de la dinornito estas la tinamo, malgranda birdo, kiu ankoraŭ flugas. Ironie, la dinornito estas la sola birdo kiu tute perdis siajn flugilojn.



*Dinornitoj atakataj de aglo de Haast  
John Megahan*

### Kivio

La plej eta kaj ĉarma membro de la palaeognathae estas la kivio. Ĝi estas la lasta, kiu restas en Novzelando kaj iĝis grava parto de la kulturo. Oni tuj

rimarkas ke ĝi ne estas kiel siaj parencoj kaj la kialo verŝajne estas la dinornito. Pro tio ke la dinornito prenis la rolon de granda herbovorulo, la kivio havus tro da konkurenco se ĝi pligrandiĝus, do ĝi restis eta. Ĝi iĝis noktulo kaj ĉiomanganto. Aldone, ĝi fosas truojn por dormi kaj kovi. La okuloj de la kivio estas preskaŭ senvaloraj. Ili estas tre etaj kaj ne helpas ĝin en la malhelo. Anstataŭe, la kivio uzas siajn naztruojn kaj estas la sola birdo kun naztruoj sur la pinto de la beko, anstataŭ sur la bazo. Pro tiu vivstilo, ĝi estas komparata interalie al talpoj. Ankaŭ la kivio havas rekordon. Kompare al la pezo de la kompatinda patrino, kiviojn havas la plej grandajn ovojn. La ovoj povas iĝi 450g, 20% de la pezo de la patrino, kaj 65% de ĝi estas ovoflavo. Ili enhavas tiom da nutraĵoj ke la idoj kutime ne aŭ apenaŭ bezonas esti nutrataj. Pro tio ke la ovo estas sesfoje tiom granda kiel estas kutima por tiom eta birdo, oni pensas ke la kivio eble estis pli granda antaŭe kaj ke la birdo malgrandiĝis, sed ne la ovo.



*Kivio, fotita de Judi Lapsley Miller*

### Disvastiĝo

La palaeognathae do estas disvastiĝintaj trans pluraj kontinentoj, sed kiel tio okazis? Kiam la grupo unue disvastiĝis, Gondvano, kiu konsistis el la hodiaŭaj sudaj kontinentoj, disiĝis. Tio instigis longan diskuton, pro tio ke oni ne sciis kiam la palaeognathae perdis sian flugkapablon. Povas esti ke ili jam dekomence ne povis flugi kaj marŝis al la diversaj


partoj de Gondvano, kie ili post la disiĝo aparte evoluis. Tiu teorio estis specife populara en la komenco, kiam oni nur povis uzi la aspekton de la bestoj kaj fosilioj por trovi la rilatojn inter ili. Alia teorio estis ke la kontinentoj jam disiĝis kaj ke ili estis atingitaj de flugantaj prauloj, kiuj poste sendepende perdis sian flugkapablon. Tiu lasta teorio sonas stranga, ĉar la ŝanco ke du organismoj evoluus ekzakte same estas tre malgranda, sed la faktoroj sub kiuj ili vivis estis tre similaj. Ili vivis en mallonga tempofenestro, dum kiu ili havis ankoraŭ neniujn konkurencojn surtere kaj ne bezonis forflugi por fuĝi. Nuntempe multaj DNA-analizoj estis faritaj kaj kombinitaj kun anatomiaj esploroj por objekte kompari la malsamajn grupojn kaj oni eltrovis ke la rilatoj estas transkontinentaj. Eĉ pli surpriza estas ke la flugantaj tinaboj ne estas gefrata branĉo de ĉiuj neflugaj palaeognathae, sed ke ili estas rekte en la mezo de la evolua branĉo, tuj apud la dinornitoj. Pro tio ke multaj birdoj el tute malsamaj grupoj perdis la flugkapablon, kiel didoj kaj pingvenoj, sed neniu alia birdo regajnis sian flugkapablon post kiam ĝi perdi ĝin, la ŝanco ke la palaeognathae sendepende perdis sian flugkapablon estas pli verŝajna.

Resumo de 19 jaroj da DNA-analizo pri la dinornito, kiu estas tro longa por esti detale priskribata, troviĝas per **tiu ĉi ligilo**

Eble ili do ne estas tiom belaj kiel tukanoj aŭ elegantaj kiel cigoj, sed palaeognathae certe estas specialaj. Per sia gigantismo kaj promenemo, ili montras tute unikan vojon, kiun evoluo povas preni kaj ili sendube estas sukcesplenaj. Eble la strategio estas eĉ tiom sukcesplena ke milionoj da jaroj post la formorto de homaro, birdoj daŭre ĉesos flugi.

verkis **Frank van Hertrooij** el Nederlando

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2019/01/30/kurantaj-birdoj/>



*Unesko-Kuriero en Esperanto profundigas la rilaton inter UEA kaj Unesko*

[https://revuoesperanto.org/unesko\\_kaj\\_unesko\\_kuriero](https://revuoesperanto.org/unesko_kaj_unesko_kuriero)

32>>

Mi kaj ankaŭ mia frato ne sopiras esti publike konataj, sed mi opinias, se tiu eksa germana soldato deziras trovi lokon, kie oni helpis al li, do, ni ebligu tion al li. Mia panjo jam ne vivas dudek unu jarojn. Ŝi neniam rifuzis helpi kaj multaj homoj pri tio ŝate ŝin rememoras. Do, rememoru eĉ tiun eksan soldaton.

Mi petas, ĉu iu povas kontakti lin, ĉu eble iu de vi helpus... ?“

u troŝparema maljunulo havas du filinojn, kiujn li edzinigis al du avaruloj. Laŭkutime, dum tradiciaj festotagoj la infanoj devas oferi, kiel ateston de sia fila pieco, donacojn al siaj gepatroj kaj bogepatroj.

Niaj ambaŭ bofiloj, kvankam avaregaj, ne povas tamen eskapi el la postuloj de la tradicia moralo. Sed, ili faras ĉion eblan por fari tiujn postulojn kiel plej akcepteblaj por ilia monsako.

La donacoj devas konsisti ordinaraj el vivantaj porkoj, kaproj, kokinoj, anasoj kaj aliaj similaĵoj. La unua bofilo imagas artifikon, kiun li tuj plenumas; li iras ĉe fabrikanto de kultobjektoj kaj aĉetas unu kolor-desegnaĵon prezentantan ĉion, kio povas kontentigi la plej ekstravagancajn postulojn de bopatro: bovoj, porkoj, kokoj kaj kokinoj, fruktoj kaj alkoholaĵoj ktp.

Nia knabego triumfe alportas al la patro de sia edzino tiujn riĉaĵojn, kiuj rezultis el la talento de religia pentristo kaj de avarega bofilo.

Kiam li alvenas, li vidas samtempe alveni la alia bofilo, kiu kaŝas ion en sia robo kaj afektas misterian mienon. La unua estas avide scivolema, sed al la demandoj, kiujn li faras, la edzo de lia bofratino respondas nur per solena muteco.

La bopatro ceremonie sidas sur sia lito por ricevi la donacojn de siaj bofiloj. Al la unua bofilo, li direktas demandon:

- Kion vi alportas al mi kiel donacojn, filo mia?

- Ĉijare, respondas la bofilo, mi malriĉiĝas kaj povas, ho patro, alporti al vi nur unu bovon, unu bovinon, anserojn, fruktojn kaj alkoholaĵojn. Jen ili. Estu bonkora por ne forĵeti tiun modestan ateston pri la pieco de filo, kiu vin amas pli ol sian vivon kaj kiu prezentas al vi la plej varmajn bondezirojn por la malfermiĝanta jaro.

Post tiu patosa deklamo, li elpoŝigas la

desegnaĵon kaj per ambaŭ manoj ĝin oferas al sia bopatro, ŝajnigante kvazaŭ li subfleksiĝus sub la pezo de la imagaj donacoj.

- Bone, - aprobas la bopatro, tute emocia, - mi vin dankas. Tamen, permesu, ke mi faru al vi tiun rimarkegon: malgraŭ via povra situacio, vi aĉetis por mi tro da aĵoj. Miaopinie, vi estas tro malŝparema.

- Kaj vi, filo mia, - li sin turnas al la dua bofilo, kiajn agrablajn donacojn vi alportas al mi okaze de la Novjaro?

Tiam antaŭenpasas la edzo de lia pli juna filino, kaj, eltirinte el sub sia robo une vergeton, kiun li zorge kaŝis ĝis tiam, la knabego rapide desegnas sur la ebenbatita tero de la planko figurojn prezentantajn maldetale animalojn, kies grandeco superas de malproksime tiujn, kiuj estas prezentitaj sur la desegnaĵo de la unua bofilo.

- Jen, ho patro, tio, kion mi povas oferi al vi kun miaj bondeziroj de feliĉa Novjaro. Mi humile petas vian pardonon pro tio, ke mi ne povas, kaŭze de la malvasteco de la pargeto de via domo, alporti al vi pli grandajn kaj pli grasajn bovojn, bovinojn kaj porkojn!

- Bonege! - aprobas la patro - Vi estas certe pli progresema ol via frato. Sed mi trovas tamen, ke tio ankoraŭ estas malŝparemo. Kaj, miaflanke, kiel dankon al tiuj signoj de fila pieco, kiujn vi ambaŭ montris al mi, mi invitas vin, karaj filoj, trinki jenan tason da alkoholaĵo.

Kaj li gestas, kvazaŭ li verŝus la trinkaĵon, "Trinkinte", la bofiloj rekonas, ke ili estas mal-indaj je sia bopatro, vere escepta genio.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/cxampiono/>

### Vortareto

**anaso** - birdo el la ordo de anseroformaj birdoj, kun mallonga kolo kaj egallarĝa beko, ofte tenata en korto.

**ĉampiono** - venkinto en sportkonkuro.

**eskapi** - sukcese eviti per forkuro.

**ekstravaganca** - kontraŭa al la komuna saĝo, sence stranga.

**lito** - meblo, sur kiu oni kuŝas por ripozi, dormi ktp.

**mieno** - esprima aspekto de la vizaĝo kaj de la sinteno.

**pargeto** - luksa planko, konsistanta el simetrie kaj varie kunmetitaj tabuletoj el malmola kaj polurita ligno.

**patoso** - emocia, solena aŭ entuziasma esprimo de altaj pensoj aŭ intensaj sentoj.

**pia** - sincere kaj ame respektoplena al Dio kaj religiaj aferoj.

**pieco** - eco de homo pia.

**vergo** - longa, maldika, rekta kaj fleksebla branĉo, kreskinta el la trunko de arbo aŭ detranĉita de ĝi.

### Solvo de la krucvortenigmo

	O	I	N	O	I
V	N	J	V	E	N
D	R		I	M	V
N	E	I		O	K
O	T	R	E	P	S
R	E	T	N	I	



**Letero metita en venton** --- Zdenek Myslivec, Ĉeĥio  
la 26-an de julio 2001 skribite al ĉeĥa radio.

Estimataj!

Mi estas via longjara aŭskultanto, preskaŭ daŭre mi aŭskultas vian elsendon, precipe „Meteor“.

Antaŭ nelonga tempo vi dissendis interparolon kun iu elstara homo de Germanio. Mi devas konfesi, ke mi ne estis tre atentema kaj eble mi ne aŭdis ĉion de komenco, eble la elsendo nomiĝis „Host do domu – Gasto en domon“. Ĉe fino de elsendo la germano rakontis sian personan rememoraĝon. Li estis dum proksimiĝinta fino de la dua mondmilito germana soldato en norda parto de Bohemio en iu vilaĝo. Tie li ekkonis virinon, kiu lavis antaŭ domo tolaĵojn. Li petis ŝin pri helpo kaj ŝi helpis al li. Germano deklaris deziron serĉi la virinon kaj lokon, kie la evento okazis.

Mi ekmemoris, ke mia patrino kutime lavis tolaĵojn antaŭ domo, ĉar post la morto de mia patro ni loĝis ĉe geavoj en malgranda ĉambro, kie oni ne povis uzi ujojn por lavi. Tie kun mi kaj panjo loĝis ankoraŭ mia frato naŭ jarojn pli aĝa ol mi.

Dum mia vivo mi kelkfoje aŭdis noton pri germana knabo, kiu iam vizitis nian familion, sed nenion certan. Nur nun, kiam mi demandis mian fraton mi eksciis, ke al nia domo je la 17-an de marto 1945 alskiiis sur mizera neĝo germana soldato, ĝuste, kiam panjo lavis tolaĵojn antaŭ domo. Li petis civilan vestaĵon kaj mia panjo, vidante knabon samaĝan kiel mia frato, ne povis ne helpi. Ŝi vestigis lin en vestaĵon post mia morta paĉjo kaj eble donis al li ian legitimilon. La uniformon panjo kun frato detruis kaj butonojn ili

enfosis. Pafilon ŝi ne volis havi hejme, ĝin ŝi donis al fidinda najbaro, ĉar ŝi timis pri knabaj ludoj. Ĉe mia frato restis nur belaj skioj, nordaj HIKORY.

Kaj nun post 56 jaroj mi eksciis detale pri la evento en propra familio, ĉar dum tempo de la evento pro la helpo al dizertinto minacis ekzekuto. Mi estis dekonujara kaj oni diris al mi nenion. Jes, mi devas konfesi, mi povus kaŭzi minacon, ĉar mi povus pri tio rakonti al kamaradoj. Cetere tiu ĉi letero estas tia ekzemplo.

Dum alveno de juna germano mi estis en lernejo kaj la frato en laborejo. Malgraŭ proksima fino de la milito, neniu povis antaŭdiri, kiel kondutos homoj, kiuj ĝis nun fieris per iu germana praavino kaj aliĝis al germana nacieco. Tamen ĉio pasis bone. La milito finiĝis kaj la evento inter aliaj multaj eventoj estis forgesita. Do, ne estis saĝe pri tio paroli inter niaj homoj, ĉar helpon al germano, eĉ li estis dizertinto, oni ne bone akceptadis, eble eĉ nuntempe. Mia panjo pri tio neniam parolis. Certe ŝi tion ne opiniis grava afero. Sed mi pensas, ke tia konduto ne estis vere ofta, la tempo estis tre komplika.

Somere 1944 mi kun kamaradoj trovis en arbaro kabanaĉon, kie vivis kvar rusaj soldatoj, kiuj eskapis el kaptejo kaj kiujn ni subtenis per manĝo kaj medikamentoj. Tia afero estis tre riska, ĉar en nia lernejo unu klason uzadis „Wermacht“ kaj germanaj soldatoj promenadis en la arbaro. Estas ironie, ke nun eĉ tiu ĉi nia agado – helpo al rusoj – ne povus ankaŭ esti favore akceptata.



>>30

## Nova romano de Julian Modest

En la komenco de 2019 Esperanta eldonejo „Libera“, Antverpeno, eldonis novan romanon de la konata Esperanto verkisto Julian Modest „Amo kaj malamo“.

La romano havas interesan allogan intrigon. La ĉefheroo, Plamen Filov, riĉulo, kies familio loĝas en „Lazuro“, la plej eleganta kvartalo de mara urbo Burgo, okaze de sia kvardekjariĝo organizas grandan feston, invitante multajn gastojn. Meznokte, kiam la gastoj foriras, Plamen Filov trovas en la korto de la domo minacan anoniman leteron. Post semajno iu murdas lin. Komisararo Kalojan Safirov, kiun la legantoj jam bone konas el la romano „Serenaj matenoj“ de Julian Modest, komencas esplori kaj serĉi la murdiston.

La demandoj estas pluraj: kiu kaj kial murdis Plamen Filov? „Amo kaj malamo“ estas por ĉiuj, kiuj deziras pasigi agrablajn horojn, ĝuante la bonegan Esperantan stilon de Julian Modest kaj perfektigi siajn lingvokonojn.

**La romano estas mendebla ĉe: Lode Van Velde, Belgio, retadreso: lodchjo@yahoo.com**

